

majo 1972
65-a jaro
n-ro 797 (5)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



libro-jaro

Vi trovos

ke ĉi tiu numero de la revuo aperas kun nekutima malfruo. La kaŭzo de tiu bedaŭrinda prokrastiĝo estas la provizora — sed grava — nesufiĉo de oficistoj en la Centra Oficejo. (Vidu la anoncon sur la antaŭlasta kovrilpaĝo.) La laboro por Esperanto ne povas esti tre profitiga el financa vidpunkto, sed ĝi ja povas esti interesa kaj mense riĉiga por homoj internaciismaj kaj iniciatemaj. Tial ni esprimas ankaŭ ĉi tie la esperon, ke troviĝos ĉiam pli da talentaj personoj, kiuj pretos dediĉi gravan parton de sia vivo por profesie antaŭenigi la movadon por la Internacia Lingvo. Pro la supre menciita kaŭzo estas antaŭvideble, ke ankaŭ la junia kaj eble postaj numeroj iom malfruiĝos, kaj ni anticipe petas pardonon kaj paciencon de niaj legantoj.

Enhavo

- 81 Kuraĝiga situacio por UEA (Sadler)
- 82 Eŭropaj ŝtatoj kunfandiĝas (Bormann)
- 83 Himno de la unueco — en dek sep lingvoj?
- 83 Plej grava lingvo por Aŭstralio
- 84 Internacia Libro-Jaro: Rolo de la esperantistoj (Auld)
- 86 Jubileo (Nedelĉeva)
- 88 Ekzempla tendaro por gejunuloj (Kilian)
- 90 Recenzoj
- 93 Por pli efika informado (9): Rimedoj (Lapenna)
- 94 Loke — Fake — Persone
- 95 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 95 Letero de leganto
- 95 Nekrologo: Albault
- 96 TEJO-paĝo
- 97 Komenco bona — ĉio bona
- 98 20-jaroj da elsendoj de Svisa Radio
- 98 57-a Universala Kongreso, Portland (Oregon), Usono
- 98 Kalendaro
- 99 Oficiala informilo: n-ro 456
- 100 Anoncetoj

La kovrilo

La Internacia Libro-Jaro 1972 komenciĝis tre kontentige en la Esperanto-movado. Se juĝi laŭ la mendoj alvenantaj ĉe la Libro-Servo de UEA, la interesiĝo pri la Esperanta literaturo forte kreskas. La sumo de la vendoj en la unuaj kvar monatoj de la jaro superis je pli ol 10% tiun de la sama periodo en 1971 — kaj tiu jaro, kiel menciite en la apuda ĉefartikolo, jam montris 50-procentan kreskon kompare kun la antaŭa. La konata poeto kaj kritikisto William Auld prezentas en ĉi tiu numero (p. 84-85) siajn proprajn pensojn okaze de la Libro-Jaro; kaj la cetera enhavo de la revuo reflektas la aktualan akcenton je literaturo kaj eldonado.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktorino: Nagata A.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendaro jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 20,90; Suda Afriko, Azio, Sudameriko 14,30; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 11,—; Mezoriento, Nordafriko 7,70 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

KURAĜIGA SITUACIO POR UEA

Konstatoj post la Estrara Kunsido

La financa situacio de UEA multe pliboniĝis. Tiu feliĉa konstato senteble influis ankaŭ la etoson de la plena kunsido de la Estraro de la Asocio, kiu okazis dum tri longaj tagoj, de la 7a ĝis la 9a de aprilo ĉi-jare, en la Centra Oficejo en Rotterdam. Ĉeestis ĉiuj ok estraranoj, el kvin landoj.

Financa pliboniĝo

Kion fakte signifas diri, ke la financa situacio pliboniĝis? Nu, ĝi havas du aspektojn: la kapitalo kaj la jarspezoj. La kapitalaj monrimedoj de UEA, kiuj dum la lastaj dek jaroj ŝvebis inter 177 000 kaj 279 000 gld., nun unuafoje superis 300 000 kaj atingis eĉ 303 000 gld. La jarspezoj, kiuj dum tiuj samaj jaroj montradis deficitajn inter 4 000 kaj 43 000 gld., nun en 1971 montris eĉ malgrandan profiton.

Kio kaŭzis tiun pliboniĝon? Ja ankaŭ en Nederlando daŭras forta inflacio, kiu eĉ plifortiĝis en la pasinta jaro, devigante la Asocion pli multe elspezi pro salajroj, impostoj, asekuro, afranko, telefono kaj ĉio, de kio ĝia funkciado dependas. La ĉefa kaŭzo de la pliboniĝo estas, ke 1971 estis la unua plena jaro de post la transiro al ofseta preso de la asociaj eldonaĵoj, kun propramane kompostado kaj fotografio en la oficejo mem. Tio permesas nun ŝpari plurajn dek-milojn da guldenoj jare, kaj konvenas ĉi tie ankoraŭfoje danki al tiuj membroj, kiuj kune donacis pli ol 12 000 gld. okaze de la aĉeto de la novaj maŝinoj.

Al la plifortiĝo kontribuis tamen ankaŭ pluraj aliaj faktoroj. La vendoj de la libroservo, ekzemple, montris 50%-an kreskon kompare kun la antaŭa jaro. (Kaj tiu kresko plu daŭras en la unuaj monatoj de 1972.) La profitoj de la Universalaj Kongresoj de post 1968 ĉiujare superis 20 000 gld., kio signifas gravan injekton de novaj rimedoj tiel al la landaj movadoj kiel ankaŭ al la Propaganda Konto de UEA. Rekta kaj nerekta financa helpo de Institucio Hodler '68, starigita ĝuste por tiu celo, ludis ankaŭ sian rolon. Iom rekreskis la nombro de individuaj membroj — kaj sekve la enspezoj el kotizoj. Kvindek tri sindonaj membroj krome aliĝis al la kampanjo

“100 x 100”, donacante po 100 gld. jare dum tri jaroj. Fine, dank’ al la konscienca laboro de s-ro Peter Zacho (Kopenhago) kaj al la kunlaboro de centoj da unuopaj membroj, la vendado de uzitaj poŝtmarkoj enspezis pli ol 3 000 gld. en unu jaro.


Kion tiu financa progreso signifas por la estonteco? Ĝi signifas, ke — malgraŭ la akceliĝinta inflacio — la ciklo de kotizaltigoj estas rompita. Akceptante la novan buĝeton por 1973, la Estraro NE bezonis antaŭvidi altigon de la membrokotizoj, kio okazis ĉiun trian jaron ekde 1958. Tio donas esperon, ke estos eble plukonstrui la lastatempan kreskon de la membronombro sen samtempa perdo de membroj pro kotizaltigo. Ĝi signifas, ke la Asocio nun disponas kapitalon por plua ampleksigo de la agado, ekzemple per pligrandigo de la teknikaj kapabloj de la Centra Oficejo. Same kiel en ĉiuj ĉeloj de la movado, tamen, la sukceso dependas ne nur de la monrimedoj sed — eĉ pli grave — de la homaj talentoj, kaj, por ĝuste profiti el la nuna favora konjunkturo, necesos altiri al la centraj organoj pli da iniciatemaj kaj laborkapablaj homoj.

Diskutoj pri agadprincipoj

Granda parto de la diskutoj en la Estrara Kunsido estis dediĉita al ĝeneralaj principoj de la estonta agado. La konkludoj estas simple resumeblaj: daŭrigi laŭ la establita linio, surbaze de la Statuto kaj Dua Baza Laborplano. Kiel konate, la Komitato en Londono starigis komisionon por ellaboro de nova laborplano; ĝis tiu komisiono finos sian laboron, tamen, plue validas la Laborplano de 1962. La Estraro konstatis, ke ĝia koncepto pri la neŭtraleco de UEA — kelkfoje atakata precipe en junularaj medioj — ricevis la apogon de la Komitato kaj de la grandega plimulto de la kongresanoj en Londono, kaj la decido firme daŭrigi laŭ la ĝisnuna linio rilatas tute speciale al la neŭtraleco de la Asocio. Aliflanke, por permesi kiel eble plej larĝan diskuton kaj helpi al la laboro de la komisiono, estos malfermita nova rubriko en la revuo *Esperanto* por artikoloj kaj leteroj pri ĉiuj aspektoj — principaj kaj konkretaj — de la estonta agado.

Raporto pri kunsido de la Estraro neeviteble riskas doni malekvilibran impreson. Se la legantoj ĝis nun komprenis, ke la tri tagojn en Rotterdam okupis nur financoj kaj agadprincipoj, ili pripensu, ke granda parto de tia laborkunsido koncernas internajn teknikajn decidojn, ekzemple pri membrovarbado, pri la informa fako, pri eldonaĵoj kaj pri la estrara raporto, aŭ pri aferoj, kiuj estos anoncitaj sub aliaj rubrikoj, ekzemple la diversaj eroj de la kongresaj programoj. Tial ni ĉi tie tuŝis nur tiujn punktojn, kiuj koncernas la ĝeneralan situacion de la Asocio kaj ĝiajn ĝeneralajn planojn. Tiu situacio kaj tiuj planoj certe ne estas kaŭzo por facila memkontento, sed, minimume, oni rajtas nomi ilin — kuraĝigaj.

VS



EŬROPAJ ŜTATOJ KUNFANDIĜAS

Werner
Bormann

Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK) estas realaĵo. Oni povas ĝin aplaŭdi aŭ kondamni, sed ĝi vivas kaj estas ĉie perceptebla. Ĝian ekziston oni konsideras en la okcidento, en la socialismaj landoj — meze de marto ĉi-jare antaŭ sindikata kongreso en Moskvo la partiĉefo Leonid Breĵnev — kaj en la tria mondo. Ĉiu scias, ke ekzistas multaj aliaj internaciaj organizaĵoj. Sed, el ili ĉiuj, klare leviĝas EEK, kiu havas *suverenajn* rajtojn kaj *memstarajn* instancojn.

Ĉefa apartaĵo de EEK estas, ke ĝi posedas suverenecon. Tio estas normalaĵo de ĉiu ŝtato, kiu potence influas la vivon de siaj civitanoj. Ŝtato ĝenerale postulas de siaj civitanoj monon (impostdevo), plenumon — dumtempan — de malbone salajrata profesio (devo soldatiĝi), lernadon de fremdlingvoj, de esperantisto eble rigardatan kiel absurdan (devo viziti lernejon). Ĝi enmiksiĝas eĉ en detalojn: se mi volas konstrui lifton en mia domo, mi devas atenti altkostajn sekurpostulojn; ne sufiĉas mia promeso esti singarda.

Kontrasto kun internaciaj organizaĵoj

Tian suverenan potencon la internaciaj organizaĵoj ne havas. La Monda Organizaĵo por Sano ne povas submeti iun ajn al devo esti vakcinita, la Eŭropa Liberkomerca Asocio "Efta" ne povas dikti buterprezon, Unesko ne povas devigi eĉ unu solan homon lerni la alfabeton, la Organizaĵo por Nutrado kaj Agrikulturo ne povas malpermesi la kultivadon de eĉ nur unu kampo, kaj UN ne povas malebligi militon. Tiu lasta ekzemplo montras, ke pli da rajtoj por internaciaj instancoj ja estus bonaj. Sed ne elradias rektaj *influoj*; nur kelkaj pozitivaj efikoj *elfluas* el ilia konvinkkapablo.

Kontraŭe al tiuj translimaj kunaĵoj, EEK rajtas surbaze de sia fonda traktato kaj de la decidoj de sia Konsilantaro de Ministroj validigi gvidliniojn, kiuj donas malvastan framon por naciaj leĝoj, kaj mem decidi en dekretoj, kiuj senpere validas en la membroŝtatoj. EEK fiksas doganojn kaj kvantolimigojn por la komerco kun la nemembroj. Ĝi korektis la ĝenerale kontraŭeksterlandanan laborpolitikon por la Komunumo. Labori translime, sed en EEK-ŝtato, fariĝis multe pli facile; la Centra Oficejo de UEA en la EEK-ŝtato Nederlando tial havas minimumajn komplikaĵojn en la dungo de EEK-civitanoj. Survoje al plena liberigo de la migrado de laboristoj, eksterlandanoj el EEK-ŝtatoj povas en tiuj ŝtatoj kunelekti la laboristarrepresentantojn (1961) kaj mem esti elektitaj kiel tiaj (1968); pluaj liberigoj venadas. EEK enmiksiĝas ankaŭ en detalojn: ĝi preskribas paŭzon por kamionŝoforo post kvarhora veturigado, indiferece ĉu li sentas sin ankoraŭ sufiĉe freŝa por kostŝpara pluveturo.

La suvereneco de EEK rilatas nur al la ekonomio. Sed tiu fako profunde etendiĝas en aliajn kampojn. Se ĉiu EEK-civitano rajtas dungiĝi en ĉiu EEK-ŝtato,

la kondiĉoj por eklaboro — do diplomoj kaj aliaj fin ekzamenoj, ankaŭ de metiistoj kaj faklaboristoj — devas esti reciproke agnoskitaj. Tio necesigas egaligon de la lernaĵo antaŭ tiuj ekzamenoj, kaj tial EEK pritraktas ankaŭ la eduksistemojn. Tiel EEK havas realajn progresojn *en multaj kampoj*. Regas paŝplenumo, ne nuraj intencdeklaroj kiel ofte en aliaj internaciaj kaj ankaŭ eŭropaj organizaĵoj. En EEK *eŭropaj ŝtatoj kunfandiĝas*.

Kiam ekestas nova suverena organizaĵo, iuj aliaj devas perdi tiun suverenecon: tiuj estas la membroŝtatoj. Kio okazas en unu lando, ne estas decidita de ĝia majoritato, sed de la majoritato en la EEK-tuto. Tio inkluzivas esencan ŝarĝigon en la potencposedo. Tial sufiĉe longa tempo por la alkutimiĝo estas necesa. Ĝi daŭras jam 14 jarojn ĉe EEK kaj certe ne baldaŭ finiĝos. Kompreneble la komplikaĵoj estas grandaj. Kiel gigantaj ili iam estos por mondregistaro, tion ni povas vidi nun en la malgranda modelo por estonta unueca mondo, la miniaturo EEK.

En la procedo forigi sin mem la naciaj registaroj enkonstruis sekurigilojn. Tiel ili volas atingi, ke post la potencperdo, do en la pli granda tuto, la naciaj interesoj estu konservataj, kvankam ili tiam estos plu nur regionaj interesoj. Ĉefe temas pri ekonomiaj esceptaĵoj, sed ankaŭ pri unu afero grava por ni esperantistoj: la lingvoj. Ĉiu civitano de EEK-ŝtato havu same senkomplikan aliron al la skribaĵoj kaj oficejoj de EEK, sen enmeto de la kribrilo de fremdlingvoscio. Estas nepra postulo, ke ĉiu povu komuniki kun la centraj instancoj de EEK en la lingvoj oficialaj en la membroŝtatoj, kiam tiuj instancoj posedas suverenajn, do "subpremajn" rajtojn super la individuoj. La traktatan reguligon de la lingva demando donas artikolo 217. La samrajteco de la lingvoj ne estis rigardata tiel grava, ke la detaloj troviĝus en la traktato mem — kiu estas neŝanĝebla! —, sed ĉiu pri lingva decido bezonas unuanimecon, kio ankaŭ estas elstarigo de la graveco. La lingva ordo estas fiksita en la dekreto n-ro 1, vere la unua memstara decido de EEK, kaj ĝi preskribas la samrajtecon de la kvar EEK-lingvoj (germana, franca, itala, nederlanda, en la oficiala sinsekvo; alfabeto vicigita laŭ la nacilingvaj esprimoj)¹.

Kun kvar lingvoj ankoraŭ eblas

Kun nur kvar lingvoj la komunumo estas laborkapabla des pli, ĉar la franca rapide fariĝis ĝenerala interkomprenilo, kaj ĉar EEK kreis al si bonegan interpretistan servon. Anstataŭ fari al si mem la penon lerni fremdan lingvon, oni pagas salajrojn por interpretistoj, do "aĉetas" la eviton de lingvolernado. Kiom pli bone laborus komunumo kun unu lingvo vere regata de ĉiuj personoj — nia propono: Esperanto — ne estas klare al la plej multaj homoj. Ni esperantistoj devas ankoraŭ multe labori por klarigi tion kaj vekti la konscion pri la ekzisto de lingvaj problemoj.

Pli konvinkaj ol paroladoj estas faktoj. En la kazo de EEK tia fakto estas la novaj membroj, kiuj kunport-



W. Bormann

1 Pri detaloj de tiu iom komplika reguligo vidu en: Werner Bormann, "Bona ŝanco", La Laguna ("Stafeto") 1970, paĝoj 219 ĝis 224.

Himno de la unueco — en dek sep lingvoj?



Eŭropa Konsilantaro (sidejo: Place Lenôtre, Strasbourg, Francujo), kiu konsistas el 17 landoj (Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Danlando, Francujo, F.R. Germanujo, Irlando, Islando, Italujo, Kipro, Luksemburgo, Malto, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Svislando, Turkujo), pasintjare elektis komunan himnon por la landoj apartenantaj al ĝi.

La himnon, kies melodio estas prenita el la "9a simfonio" de Ludwig van Beethoven, ludis jam en la 31a de decembro 1971 la Berlina Filharmonio kun di-

retilado de Herbert von Karajan, en Strasbourg. Nun oni pristudas, kian tekston doni al la melodio. Ĉu la odon de Schiller, kiu — ortodoksa — ne plu estas adekvata al la patoso de la popoloj de la ŝtatoj-membroj, aŭ proprajn tekstojn por ili laŭ apartaj decidoj? Ambaŭkaze en 17 lingvoj!

S-ro H. Lorenz, multjara UEA-membro en Svislando, tuj rimarkis tiun bezonon de la Internacia Lingvo kaj mem provis verki poemon por la jam definitive elektita melodio de Beethoven. (bildo)

Ĉu oni elektos la Internacian Lingvon, se unu sola teksto estos por la himno?

Himno ankaŭ por la tuta homaro?

Aparte de la Eŭropa Konsilantaro, usona kompanio por reklamado kaj publikaj rilatoj "The Bowes Company" nun varbas himnon el la tuta mondo por la tuta mondo.

"La himno devas superi la hemisferojn, lingvojn kaj kulturojn. La kanto estu kantebla por ĉiu homo kaj enhavu spiriton konscian pri nia eta tero en la senlima spaco". Tiaj estas la varb-frazoj de la kompanio. Usonaj esperantistoj alvokas la tutmondan esperantistaron partopreni tiun kampanjon. Informas pli detale kaj peras unu el ili, s-ro R. Kent Jones (3318 N Lake Shore Dr, n-ro 403, Chicago, Illinois 60657, Usono).

Eŭropaj ŝtatoj kunfandiĝas (daŭrigo)

as tri novajn lingvojn, per kio la lingva nombro kreskas al sep. Tio necesigas solvon, kiu laŭ la konstatato de "studkonferenco de la eŭropa movado" en julio 1969 en Dublin "plenumu la necesecojn de efikeco kaj de la plurlingva karaktero de la komunumo". La oficialaj instancoj ne kapablis trovi tian solvon. Ni konas ĝin: Esperanto. Restas al ni la tasko tion pruvi al ili.

Dume la politikistoj klopodas pri "solvoj", kiuj neglektas unu el la du cititaj necesecoj. Ĉar *efikeco* estas tute neeviteble necesa, ili volas domaĝi al la *plurlingva karaktero* per subpremo de lingvoj. Unua provo diskriminacii la danan lingvon kaj la norvegan estas la lingvoreguligo de la eŭropa universitato en Firenze². Ĉu la EEK-gvidantoj sonĝas pri "Svisa modelo"? Paraleloj ekzistas: estas po du "grandaj" lingvoj (Svislando: germana, franca; EEK: angla, franca), unu malpli signifa (Svislando: itala; EEK: germana), unu neglektebla (Svislando: romanĉa; EEK: itala), kaj en EEK unu postrestaĵo el la fonda periodo, la nederlanda kiel apudaĵeto. Tiu pensado en kategorioj de lingva hegemonio kaj lingva diskriminacio estas aĉa! Ni devas serioze admoni pri la kulturaj malavantaĝoj devenantaj el diskriminacio. Antaŭ ĝi nur Esperanto povas savi la komunumon.

² Komp. en la revuo "Esperanto", februaro 1972, paĝoj 21 ĝis 22.


Plej grava lingvo por Aŭstralio

"La japana lingvo fariĝos la plej grava lingvo por Aŭstralio en la jaroj 1970aj." Tion konkludis perkomputila prilaboro de enketo farita de la Instituto de Modernaj Lingvoj (en Brisbane) de la Universitato de Queensland.

En tiu enketo partoprenis homoj el diversaj tavoloj de la socio, kiuj studas en sia libera tempo fremdajn lingvojn. Al la demando, kiu lingvo estos la plej grava por aŭstralianoj en la sepdekaj jaroj, ili respondis jene: 57% japana, 11% indonezia, 7% itala, 4% franca, 3% ĉina, germana, 2% malaja, 1% rusa. Nur 16% de la partoprenintoj de tiu esplorado jam studas la japanan lingvon.

Kiel la motivojn de la lingvolernado, la demanditoj respondis jene: 45% persona interesiĝo, 18% vojaĝado, 12% intenco labori aŭ studi eksterlande, 9% profesio aŭ scienca esploro.

La rezulton de la enketo la direktoro de la Instituto opinias reflektanta la ĝeneralan penson de la aŭstralianoj. Li diras: "Kvankam ĉi tiu esplorado estas la unuafoja de tiu speco farita sur scienca bazo en Aŭstralio, tamen lernejoj, universitatoj kaj pedagogiaj fakuloj en ĉiuj regionoj jam esprimis similajn opiniojn. Aŭstralianoj en ĉiuj sferoj de la vivo ekkomprenas, ke la ekonomia kaj politika estonteco de ilia lando estas proksime ligita al Azio, kaj ke la sola rimedo por plifirmigi ĝin estas: lerni la lingvojn kaj kulturojn de la popoloj de Azio."



INTERNACIA LIBRO-JARO: ROLO DE LA ESPERANTISTOJ

La aŭtoro

William

Auld

en sia

skriboĉambro

La jaro 1972 estas Internacia Libro-Jaro, laŭ unuvoĉa proklamo de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Al homoj en la pli evoluintaj landoj, tia jaro povas eble ŝajni iom superflua. Unue, ĉar ja en tiaj landoj la libroj estas ĉie kaj de ĉiu akireblaj, kaj due, ĉar la televido kaj aliaj elektronikaj komunikiloj unuavide ŝajnas forpuŝi la librojn en staton de arĥaikigo. La realeco tamen ne estas tre simpla.

Ĉiu povas kompreni, ke la evoluantaj landoj urĝe bezonas librojn, ĉar la tieaj loĝantoj, postrestintaj en la pasintaj ducent jaroj, avide serĉas ĉiujn rimedojn por ĝisatingi la ceterajn landojn. Ĉu nur por ili validas speciala Libro-Jaro?

Laŭ la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro René Maheu: "Eĉ en landoj kun vigla eldonindustrio, libroj ankoraŭ ne fariĝis integra parto de ĉies vivo. Al tiaj landoj mankas la problemo, kiel havigi la libron al la legonto, dank'al iliaj vastaj distribusistemoj. Plejofte ilia nuna reala problemo (kvankam tio varias de lando al lando) estas havigi la legonton al la libro. Tion subtenas la alta pocento de nelegantoj rivelita de lastatempaj esploroj".

Klare la alveno de la televido en sennombrajn hejmojn signifas, ke por multaj homoj preskaŭ tute malaperis la instigo al legado por celoj pure distraj — kvankam oni spertis ankaŭ, ke la malalta nivelo de tre multaj programoj kelkfoje efikis inverse. Krome, por siaj politikaj kaj sociaj informoj multaj homoj

hodiaŭ dependas preskaŭ ekskluzive de la televido. Sed la televido havas klare difineblajn limojn kiel informilo kaj distrilo. Unue, ĝi estas *efemera*. Tio signifas, ke ĉion oni devas kapti je la unua aŭdo; momenta distriĝo aŭ hejma interrompo perdigas la vortojn, kaj oni ne povas ilin rekapti. Plue ĝi signifas, ke oni ne povas kontroli siajn impresojn; enketoj montris, ke homo, kiu rigardis iun programon, tre ofte konservis poste impreson tute eraran pri ĝia enhavo. Eĉ pli: kelkfoje montriĝis, ke oni konservis nenian impreson! Libro aliflanke estas daŭrema; oni povas, se necese, relegi kaj kontroli la tekston, eĉ post sufiĉe longa intervalo.

Due, la televido estas *supraĵa*. Eĉ la plej seriozaj informprogramoj ne disponas pri sufiĉe da tempo por vere ĝisfunde esplori la traktatajn temojn. Libro — eventuale en pluraj volumoj — kapablas esplori kaj elmeti temon plej detale.

Trie, la televido estas *sendistinga*. Programo celas milionojn da homoj samtempe, kies gustoj, edukniveloj, antaŭjuĝoj kaj konvinkiĝoj estas plej diversaj. Tio en la praktiko severe limigas la gamon de la programo, kaj garantias, ke ĝi ne povos kontentigi la bezonojn kaj postulojn de ĉiuj. Elektro de televida programo okazas inter tre malmultaj eblecoj; elektobleco de libro estas preskaŭ infinita.

Tion mi skribis, kompreneble, ne por ataki la televidon, sed por sugesti, ke la rolo de la libro en nia civi-

lizo estas ankoraŭ grava. Ni bezonas librojn por ĉiuj celoj studaj kaj profundesploraj; ili estas ankaŭ dezirindaj kiel alternativa distraĵo — alie nia civilizo starus sub forta danĝero fariĝi domaĝe unuaspekta kaj ununivela.

La libro antaŭ ĉio *konservas*. Ĝi konservas la kulturon, la informojn, la faktojn, la eltrovojn. Ĝi ebligas relative malmultekostan kleriĝon. Hodiaŭ oni povas konservi ankaŭ alimaniere — per sonbendoj, mikrofotoj k.s. Sed tiu konservita materialo restas ĝenerale nealirebla por la grandega plimulto da homoj. Povas esti, ke iam en la estonteco tiaj helpiloj plene anstataŭos la nunan formon de la libro en ĉies domo; sed en 1972 tio ankoraŭ ne okazis kaj efektive ankoraŭ ne proksimiĝas.

La libro estas grava. Kiom el miaj nunaj legantoj estus indiferentaj, se ĉiuj libroj morgaŭ malaperus el la mondo? Ilia rolo en la vivo de milionoj da homoj estas neanstataŭebla.

Ĉarto de la Libro

Sep gravaj Internaciaj Federacioj akceptis dokumenton, kiu nomiĝas *Ĉarto de la Libro*, okaze de la Internacia Libro-Jaro. El ĝi mi volas citi precipe la du lastajn artikolojn:

Artikolo 9

“Libera interlanda fluado de libroj esence suplementas naciajn varojn kaj helpas internacian kompreniĝon”.

Artikolo 10

“Libroj servas internacian kompreniĝon kaj pacan kunlaboradon”.

Precipe ĉi tie komenciĝas nia rolo kiel posedantoj de la Internacia Lingvo. Internacia kompreniĝo kaj paca kunlaborado ja estas la fundamentaj celoj de la Esperanto-movado kaj socia pravigo de la lingvo mem. Kaj ĝuste ĉe la “interlanda fluado de libroj” komenciĝas la influo de la lingvoj, kaj — por vera “internacia kompreniĝo” — la lingvoproblemo.

Ne multe helpas la internacian kompreniĝon enfluaĵo de libroj en lingvoj, kiujn la popolo ne scipovas. Tial, se oni rigardas la problemon laŭ skalo vere tutmonda, okazas nun, kaj okazos verŝajne pli kaj pli en la proksima estonteco, nur kvar agmetodoj. Oni fluigas librojn ĉefe inter landoj samlingvaj; tio estas bona, sed limigita. Oni trudas sian lingvon al landoj subevoluintaj aŭ politike dependaj; tio estas diskriminacia kaj — la historio supozigas — provizora; ĝi signifas ankaŭ, ke la libroj ne atingas ĉiujn popoltavolojn. Oni tradukas la librojn, aŭ en la lingvon de la aliaj landoj, aŭ en unu el la “pli disvastiĝantaj lingvoj”. La unua estas bona, sed la nombro de la lingvoj en la mondo severe limigas la eblecojn kaj malŝparas tempon kaj monon; la dua estas diskriminacia. Aŭ oni tradukas la librojn en la Internacian Lingvon — tio estas racia kaj neŭtrala; kaj ni neniam forgesu, ke “interlanda fluado de libroj” pere de Esperanto jam de preskaŭ cent jaroj okazadas en atentinde granda kvanto. La “fina solvo” de la lingva problemo, ankaŭ rilate al vere tutmonda interŝanĝo de kulturaj valoroj pere de libroj, estos en Esperanto. Sed jam nun, malgraŭ la t.n. malmultnombro de la

esperantistoj, la Internacia Lingvo signife kontribuas al la celoj klare elmetitaj en la artikoloj 9 kaj 10 de la Ĉarto de la Libro, kiu siavice konfirmas la celojn de Unesko en tiu ĉi — kaj kompreneble ankaŭ ĉiuj aliaj — jaroj.

Se ni vere interesiĝas, kiel esperantistoj, pri la internacia kompreniĝo kaj paca kunlaborado, ni devas rekoni kaj agnoski nian solidarecon kun la Internacia Libro-Jaro. Tion ni devas fari ne nur kiel organizita movado, sed ankaŭ kiel individuoj. Laŭ d-ro Maheu, “...rilate al granda parto de la mondloĝantaro oni rajtas paroli pri vera “libromankego”.

En multaj landoj troviĝas esperantistoj, kiuj sopiras al “libera fluado” de libroj en Esperanto. Tre ofte ili estas malhelpataj de valutaj bariloj aŭ aliaj cirkonstancoj. Ĉu la pli favorataj esperantistoj ne emas, precipe dum tiu ĉi jaro, havigi al tiaj amikoj almenaŭ kelkajn el la libroj, kiujn ili sopiras? Mi pensas ekzemple pri unu konata Esperanto-poeto, kiu dum multaj jaroj de teroro kaŝigis kaj tiel konservigis siajn poemojn en abelujo; tiun ekzemplon oni povus multoble ripeti en similaj cirkonstancoj en multaj landoj. Nia lingvo, kiel ĉiuj lingvoj, havas siajn idealajn ligojn por la homa animo. Ni pensu pri niaj samlingvanoj en la kunteksto de tiu ĉi Libro-Jaro.



Konservado de kulturaj valoroj

Sed Esperanto ne servas nur por interŝanĝo de naciaj kulturaj valoroj. Apud tiu grava laboro kreiĝis ankaŭ originala literaturo en Esperanto. Tiu ĉi vere unika fenomeno — la unua vere internacia, oni rajtas diri eĉ sennacia, literaturo en la moderna epoko — havas kiel sian ĉefan rolon la rekonon kaj konservadon de kulturaj valoroj baziĝintaj, ne sur naciaj unikaĵoj, sed sur homaj universalaĵoj. Ĝi spegulas tiun tradicion kaj tiun idearon, kiuj iom post iom transformis la Internacian Lingvon al varmsanga, plenforta egalulo de la ceteraj lingvoj. La sorto de Esperanto kaj la sorto de ĝia literaturo ŝajnas nedisigeblaj. Mi bone scias, ke Esperanto *povus* funkcii kiel speco de internacia komunikilo ankaŭ se ĝi ne havus propran literaturon; eble post la ĝenerala akceptado de la lingvo en ĉiuj internaciaj interŝanĝoj, tion ĝi eĉ faros. Sed mi scias certe, ke la lingvo ne estus ĝisvivinta la nunan epokon sen tiuj tradicio kaj idealismo, kiuj esprimiĝas per la originala literaturo kaj konserviĝas en la libroj portantaj tiun literaturon; kaj sen ili ĝi ne ĝisvivus la ĝeneralan akceptadon.

Ĝis la momento, kiam originala literaturo fariĝos superflua (ĉu jes aŭ ne ĝi fakte postvivus tiun momenton), estas iasence la devo de pensemaj esperantistoj subteni ĝin. Ĉar, se oni neglektos la literaturon, iom post iom forvelkos la talentoj, kiuj kapablas kontribui al ĝi, kaj iom post iom forvelkos la vivanteco de la lingvo. Kaj se tio okazus, la areno estus lasita al tiuj nemalmultaj kaj potencaj, kiuj deziras rekte malhelpi realan kaj senperan “internacian kompreniĝon”. En la Internacia Libro-Jaro ni rekonu, konkrete, la gravan rolon de la libroj en la afero de la Lingvo Internacia.



BELARTAJ KONKURSOJ 1971

Originala dramo: Laŭda mencio

Rolantoj:

Ilija

Tinka — lia edzino

Biserka — ilia nepino

Vanko — ilia bonepo

Esperantistoj

Bildo unua

(Oni vidas parton de du ĉambroj. En la unua, antaŭ granda spegulo, rigardas sin viro ĉirkaŭ 70-jara, vestita en nova kostumo — Ilija Dimitrov.)

Ilija (sola — glatigas per mano la kalvan verton) — La hararo ne gravas! Eĉ junaj homoj restas sen hararo, la tuta malfeliĉo estas la kruro, tiu tiriĝo de la kruro. (Ilija iras antaŭ la spegulo por vidi, ĉu estas rimarkebla la tiriĝo de la kruro) — Jen kio rezultas, se oni neniam ripozas! Laboro... laboro, sed kiam venis la paraliziĝo... trolaciĝo tion kaŭzas... tamen bone, ke la paraliziĝo estis malgrava... kaj mi saviĝis nur per la kruro...

(En la alia ĉambro antaŭ la spegulo la edzino de Ilija, Tinka, masaĝas facile sian vizaĝon kaj ŝmiras ĝin per kremo.)

Tinka — De kie do aperas tiuj ĉi faltoj! Ĉio venas de maltrankviliĝoj! Valentin tiel grave malsanis, Biserka, la nepino... ankaŭ pri ŝi zorgoj — tiel malfacile ŝi naskis! Hodiaŭ oni maltrankviliĝas pro unu afero, morgaŭ pro alia, oni kunpremas la dentojn kaj la lipojn pro kordoloro, kaj kompreneble la faltoj aperos... La korpo tamen (ŝi atente sin rigardas en la spegulo), la linio estas bone konservita! ! ! ...

Ilija — (malfermas la pordon inter la du ĉambroj) — Ĉu vi estas preta?

Tinka — Mi estas preta, Ilĉjo. (Ŝi ŝprucigas al si kolonjan akvon kaj ekiras al li.)

Ilija — Bone vi aspektas. (Li mezuras ŝin per rigardo.)

Tinka — Ankaŭ vi, Ilĉjo, bonege! En tiu nova kostumo vi estas denove tute juna.

Ilija — Ankaŭ via nova robo vin plijuniĝas per 10 jaroj!

(La pordo malfermiĝas kaj eniras ilia nepino Biserka kun bebo en la brakoj.)

Biserka — Avinjo, ĉu vi pretas?

Tinka — Pretaj ni estas, Biserka! Post nia reveno la bebo estos je unu monato pli granda.

(Biserka, feliĉe ridetante, rigardas tra la malfermita pordo.)

— Vanko (ŝi krias) — alvenu! Ili estas pretaj!

Vanko — (Altstatura krispharara junulo) — Ankaŭ mi pretas. Ĉu tiuj estas la valizoj?

Tinka — Tiuj. En la aŭto ja estas loko, jes?

Vanko — Estas, komprenble, unu en la pakajujo, la alia ĉe ni.

(Ĉiuj eliras.)

Bildo dua

(En la kupeo de unuaklasa vagono. Ili estas solaj. Rigardas tra la fenestro.)

Ilija (sin turnas al la edzino) — Estos interese, Tinka, ĉu, kiam ni intervidiĝos kun niaj amikoj, ni rekonos unu la alian... Kun la konatoj, kun kiuj, eĉ se malofte, ni tamen havis okazon renkontiĝi, kiel ajn, sed kun la ceteraj, kiujn ni neniam revidis! ! ! ...

Tinka (profunde ekspiras) — Ne estas mallonga tempo, 50 jaroj! Kiel rapide ili pasis! Tago post tago, jaro post jaro! ...

Ilija — Flugas, flugas la jaroj! Flugas! Kvindek jaroj, kaj kvazaŭ hieraŭ ĝi estis, kiam ni fondis la Esperanto-societon en la urbo.

Tinka — Kaj ĉu vi memoras, Ilĉjo, kiel bela estis la unua esperantista amuzvespero?

Ilija — Tiam vi, Tinjo, per via deklamado en Esperanto faris furoron. Vi estis tiel bela, ke la publiko, kvankam ĝi nenion komprenis, ekflamis. La sekvan tagon minimume 20 personoj aliĝis al la kurso por lerni Esperanton.

Tinka — Kaj vi, Ilĉjo, kiel bone vi gvidis la esperantistan ĥoron. Via figuro estis tiel svelta kiel violono, la movoj — graciaj.

Ilija — Kaj vi, Tinjo, vi estis la plej bela knabino inter ĉiuj. Simple, per rigardoj oni volis gluti vin!

Tinka — Eh, junaĝo!!!

Ilija — Jees, junaĝo kaj... malprudenteco... Apenaŭ ni finis la kurson de la gimnazio, kaj ni tuj geedziĝis... por ne estiĝi tro maljunaj aŭ ellasi la okazon geedziĝi...

Tinka — Kio, Ilija; vi eble bedaŭras?

Ilija — Ah, ne-e. Sed ĉu vi vidas Stefan Petrov, ni estas samaĝuloj, li tamen sin tenas bone, ĉiam ankoraŭ aspektas juna. Sed li edziĝis, kiam nia nepino, Biserka, naskiĝis. Lia filo nun estas 20-jara... Kompreneble, juna filo, juna patro... Kaj mi, mi jam havas eĉ pranepojn! Mi ja diris al Valentin ne edziĝi tiel frue, sed li ne obeis. Kial — li diris — vi edziĝis juna? — Ĝuste ĉar mi edziĝis tro juna, mi konsilas al vi ne fari tian eraron. Jen vidu lin, ankaŭ li jam havas nepojn... kaj ankaŭ ŝi, Biserka, ankoraŭ infano, havas jam infanon...

Tinka — Nu, tia estas la vivo, Ilĉjo... la mondo...

Ilija Tia estas la vivo, sed kun tiuj infanoj kaj nepoj ankaŭ ni frue maljuniĝis...

Tinka — Eĉ sen ili la jaroj pasas, Ilĉjo.

Ilija — Tio estas vera, sed tie, ĉe la esperantista renkontiĝo, oni per unu tono povas diri: "Mi havas 20-jaran filon," kaj tute per alia — "Mi havas trimonatan pranepinon".

Tinka — Kiu demandos vin pri tio? Vi tiel progresis en la vivo. Ĉiuj estimas vin. Vi fariĝis fama ĵurnalistoj. Al ili ne venos la ideo demandi vin pri viaj infanoj kaj nepoj. Ili interesiĝos pri la artikoloj kaj raportoĵoj, kiujn vi verkas. Precipe pri la felietonoj. Mi scias, ke ĉiuj admiras vin pro ili.

Ilija — Vi, Tinjo, ĉiam donis al mi kuraĝon kaj per viaj vortoj ĉiam inspiris min. Tion mi plej alte taksas ĉe vi.

Tinka — Ĉu nur tion?

Ilija — Ne nur tion... ĝenerale ĉion...

Tinka — Kaj kiel bonan ideon ja oni havis — okaze de la 50-a datreveno de la fondiĝo de la esperantista societo inviti per la gazetaro ĉiujn esperantistojn partoprenintajn la fondiĝon, kaj, kompreneble, ankaŭ la unuajn kursanojn.

Ilija — Bone, ke la jubileo koincidas kun la datreveno de nia abiturienciĝo, por ke ni havu la eblon intervidi kun ĉiuj samklasanoj.

Tinka — Ja ĉu ne vere ni, kiuj lernis en la lasta klaso de la gimnazio, ĝuste ni estis tiuj, kiuj fondis Esperanto-societon? Tiam ni estis tre progresemaj junuloj!

Ilija — Ankaŭ la nunaj estas progresemaj!

(Ili eksilentas. Ambaŭ rigardas tra la fenestro. Tinka oscedas kelkfoje kaj apogas la kapon ĉe la angulo de la kupeo.)

Tinka — Ŝajne mi dormemas...

Ilija — Ankaŭ mi, tial mi volas refreŝigi mian kapon per novaĵoj. (Ŝovas la manon en la poŝon kaj eligas ĵurnalon, sed baldaŭ komencas egalritme balanci la kapon super la ĵurnalo, kune kun la skuado de la vagono.)

Bildo tria

(Sur la strato antaŭ la teatro, kie okazas la renkontiĝo de la esperantistoj.)

Tinka — Ilĉjo, rapidu!

Ilija — Rapidu, sed se ne estus tiu ĉi rigida kruro.

Tinka — Estastute nerimarkeble! Ne ĝenu vin! Alie vi estas tute sana!

Ilija — Sana, vi diras, sana... Ĉu vi scias, kio? Mi ege deziras vidi ilin ĉiujn, sed tra iu trueto... Estus interese, kiel ili aspektas...

Tinka — Kiel ili povus aspekti, kiel ni! Ne pensu, ke Lenjo...

Ilija — Kiu Lenjo?

Tinka — Eh, kiu Lenjo? Vi ŝajnigas vin, kvazaŭ vi estus forgesinta ŝin... Tiu kiu komencis lerni Esperanton nur pro vi. Vi mem diris tionalmi, kaj nun...

Ilija — Kiel vi memoras tiujn aferojn!

Tinka — Kiel mi povus ne memori ilin... Konfesu do ke...

Ilija — Vi denove komencas.. Kiom da fojoj mi diris al vi, ke tiam mi nur vin amis...

Tinka — Kaj poste?

Ilija — E-e, nun vi... "poste, poste". Almenaŭ nun ne detruu mian humoron.

Tinka — Kaj vi, kiom da fojoj vi detruis la mian? Unu virino drr... per telefono, alia drr... nur mia koro scias...

Ilija — Kaj se mi komencus diri, kiom da viroj amindumis vin... kiam ni translokiĝis al Sofio... Kaj vi estis tiel bela... floranta...

Tinka — Eh, floranta... Ilĉjo, la invitilojn vi ja havas ĉe vi?

Ilija — Ĉe mi. (Li elpoŝigas la kartoĵojn kaj kune kun Tinka supreniras la ŝtuparon.)

(Supre ilin bonvenigas junaj esperantistoj.)

1-a juna esperantisto — Saluton! Saluton, kamaradoj!

Tinka kaj Ilija — Saluton! Saluton! (Ili montras la kartoĵojn.)

2-a esperantisto — Estu bone venintaj!

Ilija — Mi ĝojas vidante en mia naskiĝurbo tiun ĉi novan, belan teatron. Kaj mi salutas vin ankaŭ pri la bona ideo organizi tiun ĉi renkontiĝon.

1-a esperantisto — Ankaŭ al ni estas agrable konatiĝi kaj vidi la fondintojn... la unuajn esperantistojn en nia urbo, kiuj faris tiom multe por la "lingvo de la paco."

Ilija — Ankaŭ vi firme tenas la aferon kaj bone laboras...

2-a esperantisto — Estu tiel!


(Ilija kaj Tinka eniras.)



**Nevena
Nedelčeva
(Bulgarujo)**

EKZEMPLA TENDARO POR GEJUNULOJ

– en Lančov



La nunjara Somera Esperanto-Tendaro (SET) apud la vilaĝo Lančov, Ĉeĥoslovakujo, estas jam la dudeka. La unua SET okazis en la jaro 1952 kaj estis probable entute la unua Esperanto-tendaro. Neniu, plej malmulte la junaj organizantoj mem, tiam supozis, ke la sekvontaj ĉiu-jaraj SET-oj fariĝos la plej gravaj eventoj en la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakujo. Pli ol 4 000 lernantoj partoprenis jam iliajn kursojn.

La unuajn SET-ojn partoprenis 12-15 jaraj geknaboj; la organizantoj estis nur du-tri jarojn pli aĝaj. La junularan karakteron konservis al si la tendaroj ĝis nun, tamen la pli postajn partoprenis ankaŭ pli aĝaj perso-

TH. KILIAN

noj, kiel montras la statistiko el 1969 (12- ĝis 20-jaraj: 55,6%; 21- ĝis 30-jaraj: 18,8%; pli ol 30-jaraj: 25,6%. Sume 223 personoj). La geknaboj partoprenintaj la unuajn tendarojn fariĝis jam maturaj homoj kaj partoprenas nun la tendaron kiel E-instruistoj, kvankam la SET-oj estas destinitaj por enlandaj lernantoj, tamen eksterlandaj junuloj parolantaj bone Esperanton estas en limigita nombro bonvenaj gastoj. Ili plialtigas la lingvan nivelon de la progresintaj tendaranoj devigante ilin paroli Esperante.

Multajn eksterlandajn gastojn mirigas la granda nombro de geknaboj. Ili plendas pri sia senefika varbado

JUBILEO

(daŭrigo de p. 87)

Bildo kvara

(Salono plena de sidantoj, kiuj libere konversacias kaj gaje ridas. Tinka kaj Ilija eniras. Juna esperantisto bonvenigas la paron kaj levas facile la manon al la sidantoj. Ekestas silento.)

2-a esperantisto — (al la publiko) — Karaj geamikoj, en la momento alvenis inter ni Ilija Dimitrov, la unua sekretario elektita ĉe la fondkunveno de nia esperantista societo "Hela Estonteco", kaj ankaŭ ĥorĝvidanto de la tiama granda Esperanto-ĥoro, kies fondinto tiel same li estas. Kaj lia edzino, Tinka Vasileva, kiun ni havas la honoron vidi inter ni, estis iam la plej bona interpretistino de versaĵoj de Zamenhof. (Unu momenton la enirintoj kaj la sidantoj rigardas reciproke, kaj tuj eksplodas fortega rido. Samtempe maljunaj iamaj ĝvidantoj de la Societo kaj iliaj hodiaŭaj anstataŭantoj manpremas kaj brakumas unu la alian. Poste Tinka kaj Ilija sidas sur speciale por ili elektitaj lokoj. La pordo malfermiĝas, kaj oni enkondukas maljunan esperantiston.)

2-a esperantisto — (Levante la manon por silento) — Karaj gekamaradoj, per sia ĉeesto honorigis nin la iama plej fervora esperantisto. Per sia neelĉerpebla energio, flamanta animo kaj fajra parolado, li estis la plej aktiva disvastiganto de nia bela lingvo Esperanto. (Ekestas neordinara silento, la publiko mutas, ĉar antaŭ ĝi staras altstatura, ŝrumpita viro, kun klinitaj

ŝultroj, kun velke flava vizaĝo, grizhara kaj kun okulvitroj. El la unua vico aŭdigas voĉo de la publiko: — "Ĉu vi estas, Manol?")

Manol — Mi kompreneble. Sed kiu vi estas?

Milan — Ĉu vi verne povas rekonii min? Mi estas Milan, la portisto de nia Esperanto-standardo. Krome, ni du ja estis kantistoj en la ĥoro...

(Manol rigardas jen tra la okulvitroj, jen super ili. En la tuta salono eksplodas rido. Ĉe ĝia mallaŭtigo:)

Ilija — Tinjo, diru al mi sincere: se vi estus renkontinta sur la strato Manol, ĉu vi estus lin rekoninta?

Tinka — En neniu okazo! Kio ja restis de li? Ĉu vi memoras, kiel svelta kaj bela li estis! Liaj okuloj brilis pro ideo flamo.

Ilija — Ĉu mi povas ne rememori? Nun tamen, se mi interpuŝiĝus kun li, mi ne povus rekonii lin.

(La aranĝanto kondukas Manol al libera sidloko ĉe Tinka kaj Ilija.)

Ilija (etendas al li la manon) — Saluton, Manol, saluton!

Manol — Saluton! Sed atendu (ĝustigas la okulvitrojn), kiu vi estas?

Ilija — Ilija, Ilija Dimitrov.

Manol — He, Ilĉjo, ĉu vere vi estas, frato mia? Ja tiel okazis, ĉar ni ne intervidiĝis... ofte. Ni iom forgesis unu la alian...

Ilija — Diru, ke ni jam maljuniĝis...

Manol — Nu jes, ĝuste tiel, vi pravas...

2-a esperantisto — (Levas la manon por silento) — Inter ni en la salono estas Elena Pamuklieva, la plej bona solistino en la iama esperantista ĥoro, kaj samtempe multjara artistino en la loka teatro. Ni devas emfazi, ke ŝi ĉiam akceptis nian inviton partopreni

inter la junularo kaj demandas, kiel eblas akiri ilin en tiel alta nombro. La respondo estas simpla: donu al ili tion, kion ili ŝatas kaj deziras: romantikan arbarorican regionon kun rivero aŭ lago, dupersonan tendon, kiun la loĝantoj devas mem starigi kaj kiun ili ekipas laŭ sia plaĉo kaj fantazio per memfaritaj seĝetoj, tabletoj, tripiedaj branĉkandelingoj kaj dekoj da bagateloj, kiuj donas al la loĝantoj la senton, ke ĝi estas "ilia" tendo kaj hejmo; veku en ili la solidarecon de "unu granda rondo familia" per kolektado, segado kaj hakado de brulligno por la kuirejo de "ilia" tendaro; ne forgesu la banadon kaj diversajn ludojn, interesajn ekskursojn kaj konkursojn; aranĝu vespere tendarfajron kun ĉielen flagrantaj flamoj kaj



kun kantoj kaj amuzaj skeĉoj; la knabinoj ŝatas timi, do ŝercemuloj rakontu pri fantomoj en blanka robo aŭ kavaliroj en klakantaj kirasoj. Tiamaniere ekregos en la tendaro familiara etoso, kaj la kontentaj tendaranoj revenos venontjare kaj varbos novajn adeptojn. Ĉio ĉi estas amuzaj akcesoraĵoj; la ĉefa celo estas kompreneble Esperanto. Ĝi estas instruata ĉiun antaŭtagmezon dum 4 horoj en kursoj A por komentantoj, B por progresintoj, C por konversacio kaj Ĉ por estontaj Esperanto-instruistoj. La kursoj finiĝas per rigoraj ekzamenoj, kaj kursanoj ricevas diplomon, kiu estas konstanta instigilo al diligenta studado dum la tuta kurso. Por ricevi diplomon kun "eminente", multaj kursanoj studas kaj ripetas eĉ posttagmeze en sia libera tempo.

La SET-oj estas entreprenoj sen profita celo, ĉiuj laboroj en la tendaro okazas senpage, nur la kuiristinoj ricevadas moderan salajron, la instruistoj ne pagas kotizon. Tio ebligas ege malaltan kotizon por la kursanoj.

Vere impona estas la vico de 20 SET-oj, sed ne malpli impona estas la persistemo de la lerneja direktoro s-ro Pavel Sittauer, kiu kiel 17-jara junulo iniciatis kaj organizis la 1-an SET-n kaj kun siaj helpemaj kunlaborantoj, escepte de unu, ĉiujn ceterajn, oferante dum dudek jaroj siajn lerneajn feriojn.

per interesaj Esperanto-programeroj la solenajn kunvenojn de nia societo.

(Elena Pamuklieva profunde riverencas antaŭ la publiko. Ŝi estas vestita en bluzo el rozkolora tulo, verda jupo, ĉe la ŝultroj ŝi surhavas brilantan orientlandan skarpon. Ŝi mem estas forte ŝminkita, kun blondigita hararo.)

Tinka (duone stariĝinte) - Ĉu tio estas Helenjo?

Voĉo el la publiko - Lenjo, Lenjo, ĉu vi estas, animo mia, vi revo de mia juneco kaj kaŭzinto de miaj sendormaj noktoj?

(Aŭdiĝas rido, kiu transiras en ŝtormon de aplaŭdoj. Tinka skuiĝas pro rido. Kiam la rido ĉesas...)

Tinka - Dio mia, ĉu tiu estas Helenjo, la iama delikata knabino, kiu ravis per siaj rideto kaj voĉo?

Ilja (fikse rigardas ŝin, lia mieno esprimas doloron.)

Tinka (tiras la manon de Ilja) - Ilja, vi denove raviĝis? Vi ne satiĝis pri la pasinteco, ho ne, vi ankaŭ nun fikse rigardas ŝin!

Ilja - Ĉu mi fikse rigardas ŝin? (Li ridetas amare.)

Tinka - Vi, kiu do alia?

(La pordo malfermiĝas. Eniras energia grandaĝa virino, Zora.)

Zora - Karaj geamikoj, tiu estas mi, Zora, kaj tiuj ĉi tie (ŝi montras la enirintojn kun ŝi) estas du el la generacioj de miaj denaskaj esperantistoj. La tria generacio ne povis veni, ĉar ankoraŭ ĝi kuŝas en sia korbetto. Nu, kial visidas tiel mute, konsternite... Ĉuvine rekonis min! ... Brave al vi!

(Zora neatendite ekkantas malnovan esperantistan kanton... "Sur la strato ni parolas Esperanton, por ke ne komprenu nin niaj patro kaj patrin'! "...)

Iu el la sidantoj - Zora! Zora! Ni rekonisvin. (Ili kun-kantas... ĉe la silentiĝo.)

Tinka - Tio estas Zora, la Petolulino, Ilĉjo.

Ilja - Jes, jes estas ŝi.

Tinka - Ĉu vi memoras, kia sensacio ekestis, kiam ŝi forkuris ĝuste antaŭ la maturecekzameno kun grupo da vagantaj artistoj?

Ilja - Kiel mi povus ne memori! Ŝi estis freneza pro amo al iu el la artistoj.

Tinka - Ŝajne ankaŭ vi aspiris al ŝi.

Ilja - Nu, Tinjo, vi troigas.

Tinka - Neni el mi troigas, ja diru la veron - ŝi plaĉis al vi.

Ilja - Ŝi plaĉis al mi, ĉar ŝi bele ludis kaj kantis ĉe la lernejanaj amuzvesperoj. Ankaŭ al vi plaĉis la artisto, kun kiu Zora forkuris.

Tinka - Vere, li estis fabele bela.

Ilja - Kaj vi volis forkuri kun li, ĉu ne vere?

Tinka - Ne, Ilĉjo, mi nur vin amis dum la tuta vivo.

Ilja (ekspiras profunde kaj viŝas la ŝviton de sur sia nuko.)

(Sekvas komunaj muzikaj eroj plenumataj de ĉiuj: la himno de la esperantistoj, kelke dapopolkantoj.)

Tinka - Ĉu vi scias, Ilĉjo, vidante ĉiujn, mi konstatas, ke ni tamen ne tre ŝanĝiĝis...


Ilja - Ankaŭ al mi tiel ŝajnas...

Tinka - Kaj kiam ni kantas kune, mi diras al vi sincere, kvazaŭ ni denove reirus al tiuj jaroj... kiam niaj koroj vibris pro juneco kaj idea flamo... Rigardu ilin...; la vizaĝoj de ĉiuj lumas...

(Ĉiuj denove ekkantas entuziasme.)

/FINO/

ENTUZIASMIGE RAPIDA PROGRESO



Recenzas William Auld (Skotlando):

Complete seven-day Esperanto course for international correspondence, de L.T. Tanaka. Portland: Green Star Trading Company, 1972. 247. p. 27 cm.

Zamenhof desegnis sian lingvon kun tiu konscia celo, ke oni povu rapidege akiri supraĵan konon de ĝiaj esencaj trajtoj kaj tiel efektive ekuzi ĝin preskaŭ tuj. Neniu en la plej fruaj tagoj frekventis plurmonatan kurson antaŭ ol skribi poŝtkarton aŭ eklegi libron. Kompreneble la lingvaĵo uzata post kelkhora studo ne estis ĉiurilate modela — sed servis la elementajn bezonojn de la komencanto. Bedaŭrinde tiu praktika sinteno preskaŭ tute perdiĝis en la posta periodo, kaj kursoj kaj lernolibroj, malgraŭ la reklamata facileco de Esperanto, fariĝis preskaŭ tiel komplikaj kiel la naci-lingvaj.

Feliĉe, en la nuna tempo oni komencas retrovi la grandajn avantaĝojn de la simpleco kaj reguleco de Esperanto, kaj tiu ĉi kurso por anglalingvanoj certe kapablas fari tion, kion ĝi pretendas, nome: konigi la esencon de la lingvo en nuraj sep tagoj. Per tia metodo la lernanto ne enuiĝas, sed kontraŭe entuziasmiĝas pro la rapida progreso.

La materialo de la kurso estas tute fidinda, ĝisdata kaj sagace aranĝita. Post la septaga materialo sekvas pli profunda traktado de studindaj gramatikaj temoj, utilegaj vortlistoj kaj reprezenta materialo. Mi varme rekomendas la libron, kaj deziras al ĝi la meritatajn sukcesojn.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

BONASPEKTA KAJ BONSTILA

Recenzas Tibor Sekelj (Beogrado):

La dolĉa Franclando, de Pierre Delaire. Orléans: Centre National Espéranto-Office, 1972. 127 p. Ilus. 22 cm.

Bonaspektaj kaj riĉe ilustritaj libroj kaj prospektoj jam ne impresas per si mem la Esperantan leganton. Tamen tiu ĉi verko elstaras per sia sobra aspekto, senmakula tipografio, bonkvalita papero kaj majstraj fotoj (nigra-blankaj), same kiel per la vigla rakontmaniero kaj leĝera, senkonvencia stilo. La aŭtoro gvidas la leganton de regiono al regiono, de loko al loko, kune kun siaj "etaĵ, dolĉaĵ, graciaĵ, ravaj, junaj" amikinoj diversnaciaj, jen aperantaj, jen malaperantaj, laŭplaĉe. La mallongaj, kvazaŭ preterpasaj priskriboj incitas la apetiton de la leganto pri katedraloj, kasteloj, monumentoj kaj historiaj okazaĵoj, sed ankaŭ pri famaj vinoj kaj gastronomiaj frandaĵoj. Ni "renkontas" ankaŭ muzikistojn kaj verkistojn en iliaj naskiĝlokoj, kun iliaj laŭkazaj eldiroj.

Estas bedaŭrinde, ke s-ro Delaire ne uzas fotilon, ĉar kiom personaj estas la tekstoj kaj subskriboj al la fotoj, tiom nepersonaj la fotoj mem, verŝajne liveritaj de turistoficejo. Iom ĝenetas multaj francismoj, kiel "tute" anstataŭ "tre", "oni bone amas", anst. "oni (tre) amas", k.a. Troas la senĉesaj dolĉigaj epitetoj: ĉio estas ĉarma, majesta, magia, grandioza, ensorĉa, poeziplena. Tamen tio ne ĉiun ĝenas. Libro rekomendebla kiel plezura kaj informa legaĵo.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

PUPTeatra Lingvo: Esperanto

Recenzas R. Bánky (Budapeŝto):

Kvar pupteatraĵoj de A. Popesku: "La blua erinaco", "Roserulo — la raneto", "La Lanug — hometo", "Unu sunradio". Tradukis Jozefo Petrin. Bukareŝto: Rumana Nacia Komitato de U.N.I.M.A., 1970. 65p. Mimeografita. 29cm.

Tri pupteatraĵoj de Aleko Popoviĉi: "Knabino serĉas kanzonon", "La pupo kaj la museto", "La fabelo de la salo". Tradukis Jozefo Petrin kaj Julia Sigmund. Bukareŝto: Rumana Nacia Komitato/UNIMA, 1971. 35p. Mimeografita. 29cm.

En du maldikaj kajeroj en la eldono de la Rumana Komitato de U.N.I.M.A. (U.N.I.M.A. = la internacia organizaĵo de pupistoj) oni trovas sep pupteatraĵojn, tradukitajn de Jozefo Petrin kaj Julia Sigmund. Kelkaj el tiuj ĉarmaj fabeloj jam estis prezentitaj esperantilingve okaze de la ĉiujara Pupteatra Internacia Festivalo en Zagreb, kaj ĉiam ili ĝuis la meritatajn sukcesojn kaj premiojn.

Por tiuj, kiuj ne povis persone vidi la vivigitajn fabelojn, povas esti interesa legaĵo, kaj por la plenkreskuloj kaj por la infanoj, ĉar ankaŭ en la libro-formo ili portas la poezian enhavon, kreante "Fabelujon", kie la bestoj paroladas, kie povas ligiĝi amikeco inter la kripla Pupo kaj la Museto, kie la helpanto de la Blua Erinaco povas esti mem ia ĉiela nubo. Nur tiam, kiam oni laŭtlege el tiuj fabeloj al esperantistaj infanoj, estigas problemon tiu ĉi literaturnivelo, kies vortuzado grandparte superas la infanĝan vortrezoron. Kune kun tio, — legante la du kajerojn oni bedaŭras, ke tiuj estas nur en formo mimeografita, ĉar ili meritis pli belan eksteran aspekton.

Inter la pupistoj de la mondo tago post tago disvastiĝas la klopodo: fari Esperanton pupista faklingvo, kaj pri tio vere estas serioza signo — la konsento inter la Rumana Esperanto-Movado kaj la tiea U.N.I.M.A. kies konsenton atestas tiuj esperantlingvaj pupteatraĵoj.

EDUKADO, LINGVO EN VJETNAMUJO

Recenzas Hoŝida Acuŝi (Japanujo):

La ĝenerala instruado en V.D.R. Hanojo: Fremd-lingva Eldonejo, 1971. 142 p. 19 cm.

Por ĉiu nacia lingvo ekmarŝanta al nova stadio de sia evoluo, plej gravas la problemo renovigi la edukadon de la popolo. En Vjetnamujo, longe suferinta kolonian regadon, la politikan lukton por sendependado kaj revolucio ĉiam akompanis la lukto kontraŭ analfabeteco, por la alprenado de la vjetnama kiel tutlanda lingvo.

La ĝenerala instruado startis ses tagojn post la sendependiĝo en septembro 1945, kiam Prezidanto Ho Chi Minh subskribis la dekreton pri "Popola Instruado". La analfabeteco, reginta 95% de la popolo en 1945, draste malkreskis post dekelkaj jaroj. Ĉi tiu libro

prezentas diversajn fazojn de la ĝenerala instruado dum tiuj 25 jaroj de milito, malsato, aŭ sub bombardadoj, en kamparo, montregiono de naciminoritatoj aŭ en vartejo.

La lasta ĉapitro "La tradicia instruado en Vjetnamio" estas leginda historieto de la vjetnama kulturo de du mil jaroj.

Mendu ĉe UEA: 1,80 gld. (por Nederlando 1,88 gld.) + sendkostoj 10%.

La vjetnama kaj ĝia utiligo por la supera instruado en V.D.R. Hanojo: Fremd-lingva Eldonejo, 1969. 137 p. 19 cm.

Ĉe disvastigo de kulturo, samtempe okazas eksporto de lingvo aŭ vortoj. La antikva ĉina, literatura ĉin-lingvo, havis influon "kiel internacia lingvo" tra tuta orienta Azio, same kiel la latina en okcidenta Eŭropo.


Tiel multege da ĉindevenaj vortoj troviĝas en la lingvoj vjetnama, korea kaj japana, precipe en la kampoj kultura, scienca, teknika k.a.

Ĉi tiu libro diras, ke vjetnamoj oponas kontraŭ la pruntoj de fremdaj vortoj, ne strikte necesaj, ĉar "terminologio havu popolan karakteron".

Unika libro pri lingva problemo en Azio, sugestoriĉa kaj instrua kun iom abundaj ekzemploj.

Mendu ĉe UEA: 1,—gld. (por Nederlando 1,04 gld.) + sendokostoj 10%.

Por la du libroj komune: En tiuj du libroj rimarkiĝas iom da francismoj nenecesaj, forigindaj pro la pureco de nia lingvo internacia.



NACIISMO EN MONDA VESTO

Recenzas Poul Thorsen (Kopenhago):

Sileziaj kantoj, de Peter Bezruč. Tradukis T. Pump, J. Kořinek, R. Hromada. Opava (Ĉeĥoslovakujo): Distrikta Popola Biblioteko, 1970. 121 p. 20 cm. Petr Bezruč (1867–1958) atingis 100-jaran omaĝon de Unesko — tamen sendube estis poeto forte oponanta establitan "ordon". Dise en la versoj aperas pri li mem amaraj epitetoj: kurioza birdo, fantoma barado, Beskida Don Kiĥoto, Ahasvero de ĉeĥa konscienco k.a.

Kun maloftaj lirikaj esceptoj lia konstanta temaro estas profunda aflikto pro la tiutempa pola-prusa muelŝtona premo al la ĉeĥaj lingvo kaj kulturo. (Ĉu malfacilas trovi freŝajn paralelojn?) — Grimacas ĉagrenoj, gapas vundoj de nacia fiero, minacas venĝemo preskaŭ ĝis monomanio.

Konsiderante krome la tute oftan, ĝeneraligan kondamnon al judoj, oni rajtas dubi, ĉu vere tiel forte naciisma verko meritis vestadon en tutmonda lingvo?

Kaj tamen ĝi meritas! Troviĝas ja ankaŭ tenera sentemo, realisma kontraŭmilitemo, larĝaj eposoj kun brilaj klasikaj alegorioj, rustikaj* ĉarmaĵoj ktp. — Finfine la poeto mem, konscia pri amaro trudita al li, kvazaŭ rimorsas** (p. 82), ĉar "Dio konfuzis mian menson."

La kolekto ne koheras kaj ne estas facile penetrebla. Ĉu tro fidele tradukita? Post kutimiĝo kaj konsulto de bona notaro tamen la lego pli facile fluas malfermante perspektivojn de grandioza formo: apliko de proks. perfekta poetiko, kiu marteladas ritme kaj rime la melankolian muzikon de buntaj sileziaj loknomoj.


Mendu ĉe UEA: broŝ. 2,— gld., bind. 3,— gld. (por Nederlando: broŝ. 2,08 gld., bind. 3,12 gld.).

* rustika: prezentanta naturan aspekton por arta vidpunkto (red.)

** rimorsi: senti konsciencan riproĉon (red.)



UNUA LIBRO PRI INSULO JAEJAMA



El "La vojaĝoj al la sudaj insuloj"

Recenzas Eriko Sunardo (Indonezio):

La vojaĝoj al la sudaj insuloj, de Hori S. Maebaŝi (Japanujo): Esperanto-societo en la Universitato de Gumma, 1971. 64 p. 19 cm. Ilus.

Tiu ĉi libreto konsistas el du partoj, kiuj temas pri vojaĝoj respektive al insularo Jaejama kaj al Tajvano. Jaejama situas oriente de Tajvano kaj sudokcidente de Okinavo.

En la unua parto la aŭtoro rakontas pri diversaj plantoj kaj bestoj, troveblaj sur la insularo. Legante la rakonton, oni havas la impreson, ke prof. S. Hori estas fakulo pri biologio. La libreto estas valora en tio, ke ne multe ekzistas literaturo pri Jaejama, kaj certe ne en Esperanto.

La dua parto pritraktas mallonge la historion de Tajvano. Anstataŭ japanlingvaj vortojn kiel "amagasa-hebi" por *Bungarus multinctus*, "ban-zabro" por *Psidium guajava*, "ŝaka-to" por *Anona squamosa*, mi preferus la Esperantajn nomojn bungaro, gujavo kaj anomo aŭ sukerpomo. "Karikulumo" ne estas Esperanta. Kial ne uzi la simplan vorton "instruplano"? "La vojaĝoj al la Sudaj Insuloj" estas leginda, malgraŭ tio, ke rakontante pri siaj travivaĵoj en Tajvano, la aŭtoro akcentas sian nacian senton kiel japano.

Mendu ĉe UEA: 1,80 gld. (por Nederlando 1,88 gld.) + sendokostoj 10%.

PERLO PENSIGA

Recenzas Marjorie Boulton (Britujo)

Eta vivo, Clelia Conterno Guglielminetti. La Laguna Régulo-Perez, 1970; Stafeto, Beletraj Kajeroj n-ro 37 134 p. 19 cm.

Malgranda libro sed grava; poemaro siaspece senmanka. Clelia Conterno Guglielminetti verkas subjektive pri edzina, patrina kaj instruista amo, tiel aŭtentike, artisme kaj profunde, ke ŝi atingas universalecon.

Brilaj bildetoj tre vive realaj, kristala klareco, impresoj de absoluta sincereco; kaj sur ĉiu paĝo oni povas percepti, ke la poetino estas fakulino pri beletristiko kaj estiminda itala verkistino — ne pro trudita erudicio aŭ insisto pri aŭtoro vivo, sed pro la altaj literaturaj kriterioj.

Balasto tute mankas. Individua voĉo protestas kontraŭ milito, pli konvinke ol iu ajn politikaĵo. Stilo, sento, intelekto, sincero. Perlo pensiga.

Mendu ĉe UEA: 7,20 gld. (por Nederlando 7,49 gld) + sendokostoj 10%.

RETORIKO: JAM TRIA ELDONO

Recenzas Fernand Roose (Belgujo)

Retoriko, de Ivo Lapenna. Rotterdam: la aŭtoro, 1971. 294 p. 20 cm.

En la komenco de tiu ĉi recenzo mi volas atentigi, ke aparte menciindaj estas la du antaŭparoloj (de Rossetti kaj prof. Waringhien), kiuj estas la kontraŭo de la ofte banalaj nenion dirantaj enkondukoj; laŭ enhavo kaj laŭ formo ili pliriĝigas la libron.

La verko konsistas el du partoj: 1) la lingvo; 2) la retoriko. Plie sekvas, kiel aldono, kelkaj modeloj de paroladoj, kun komentario de prof. Lapenna. La du temoj estas strikte science pritraktitaj. En la unua parto estas pristuditaj: la ekesto de la lingvo; la lingvo kiel socia fenomeno; la faktoroj influantaj la lingvojn; la formiĝo de grandaj komunaj lingvoj, la internacia lingvo; kaj ĉapitro pri lingvo kaj penso. En la dua parto: la ecoj de la oratoro; la publiko; la diversaj specoj kaj partoj de la paroladoj; preparado kaj elokucio*.

Kiel decas en scienca libro, troviĝas indekso. Bedaŭrinda estas la manko de bibliografio. Ja, en la "kritika aparataro" (= la notoj sube de la paĝoj) estas menciitaj multaj verkoj. Tamen mankas gravaj libroj kiel ekz. L. Léau kaj L. Couturat: "Histoire de la Langue Universelle" (eldonita de Hachette en Parizo) en la noto 109 sur la paĝo 102. Mi nomas la verkon scienca i.a., ĉar en la komenco de la temo oni povas legi sufiĉe ampleksan historian pritrakton de ĝi. Efektive oni neniam konas nek komprenas iun fakon komplete, se oni ne konas ĝian historion. Alia scienca karaktertrajto estas, ke la aŭtoro, ĉiufoje kie necesas, insistas pri la ĝusta kompreno de la terminoj kaj la ĝusta enhavo de la nocioj. Fakte en ĉiuj ĉapitroj la aŭtoro devigas nin pensadi... kaj li malkovras facetojn, pri kiuj preskaŭ neniu konscias. Sur la paĝo 67 oni sentas ĉe I.L. la senton de insultiteco, kiam li konstatas la malhumilan kaj malrespektan sintenon de tiel nomataj sciencistoj je nia lingvo kaj movado. Mi havas absolute la saman senton. La dua parto, pri retoriko, estas tiel riĉa je ideoj, rimarkoj, indikoj, ke oni havas la impreson, ke li vere nenion forgesis. Sed kie la verkinto priskribas la honestecon de la oratoro, kaj kie do ni troviĝas sur la tereno ne nur de la moralo, sed ankaŭ de la psikologio, tie eble li ne sufiĉe atentis la psikan fenomenon de la memtrompo, de la memblindigo, fenomeno tiel ofta ĉe la homo.

Mi konkludas: pro la riĉega enhavo, pro la ekzempla stilo kaj pro la altaj sciencaj kvalitoj, tiu ĉi libro alportas ŝtonegon al la konstruo de nia "mirinda literaturo", pri kiu Lapenna parolas sur p. 67.

Mendu ĉe UEA: 20,— gld. (por Nederlando 20,80 gld.) + sendokostoj 10%

* elokucio = parto de la retoriko, kiu pritraktas la manieron eldiri la paroladon antaŭ la publiko. (red.)



C. Conterno

Por pli efika informado (9)

RIMEDOJ

IVO LAPENNA

La Principaro de Frostavallen mencias la ĉefajn rimedojn, kiujn la Esperanto-movado kutime aplikas sur la kampo de informado. Jenaj eblecoj estas utiligeblaj: artikoloj en nacilingvaj gazetoj kaj periodaĵoj; mallongaj informoj kaj sciigoj; paroladoj por ĝenerala publiko kaj prelegoj aŭ lekcioj en specialaj medioj, ekzemple en sciencaj institucioj, universitatoj, lernejoj, literaturaj societoj, sindikatoj, studentaj organizaĵoj, diversaj asocioj ktp.; prelegoj kaj informoj per radio aŭ televido; afiŝoj kaj flugfolioj; diversaj aktualaj sloganoj; ekspozicioj; filmoj; eventuale aliaj rimedoj laŭ la landaj aŭ lokaj cirkonstancoj.

La principoj pri la necesa kvalito, pritraktitaj en la antaŭaj artikoloj, devus esti konsciece aplikataj al ĉiuj rimedoj de informado. La esenca postulo estas absoluta objektiveco, t.e. nek troigo de atingoj, ankoraŭ malpli nesperiozaj blufoj, nek prisilento de realaj sukcesoj. Oni memoru, ke oni eble povas trompi iun la tutan tempon, aŭ la tutan mondon dum kelka tempo, sed oni ne povas trompi la tutan mondon la tutan tempon. Blufoj kaj nesperiozaĵoj — inkluzive nomojn de Esperanto-instancoj, kiuj neniel respondas al la faktoj — kaŭzis kaj kelkfoje plu kaŭzas tiom da malbono al la afero de la Internacia Lingvo, kiom eĉ la plej bona kaj serioza informado ne povas ripari. Meti etiketon de ĉampanvino sur botelon de vinagro ne ŝanĝas la enhavon de la botelo, sed kompromitas la etiketon.

Kompreneble, en unu prelego aŭ en unu artikolo oni certe ne povas diri ĉion pri la Internacia Lingvo — kaj tio ankaŭ ne estas necesa — sed oni ja devas diri tion, kio estas grava en la konkreta kazo. Grandparte ĝi dependas de la medio, al kiu oni sin turnas: en unu maniero oni skribas artikolon por ĉiutaga gazeto kun amasa legantaro, kaj tute alimaniere oni verkas por faka organizaĵo. La samo validas por ĉiuj aliaj rimedoj de informado.

Afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj, sloganoj kaj similaj presaĵoj devas esti ne nur celtrafaj enhave, sed ankaŭ modernaj laŭ la aspekto; alie eĉ la plej bona enhavo povas esti komplete detruita pro la malmoderna, kelkfoje vere mizera aspekto. Se la presaĵo ne estas taŭge prezentita, oni kutime atingas precize la malon de tio, kion oni celis: anstataŭ altiri la publikon, oni malproksimigas ĝin.

■ ■ ■

En la lasta tempo aperis diversaj informaj broŝuroj kaj flugfolioj, kiuj povas esti rigardataj kiel bonaj ekzemploj de presaĵoj respondantaj al postuloj de moderna informado. Menciindaj estas aldone al diversaj dokumentoj de CED, precipe "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo" (jam publikigita en 13 lingvoj), la lasta eldono de la seslingva flugfolio de UEA "La Internacia Lingvo Esperanto", la broŝuro "Esperanto, a First Foreign Language for All Mankind" de B. Cavanagh, eldonita de la Brita Esperantista-Asocio; "The ABC's of Esperanto", eldonita de la firmao Channing Bete, Usono; "Moderne Menschen sprechen Esperanto" eldonita de Germana Esperanto-Asocio; pluraj tre modernaj kaj trafaj broŝuroj eldonitaj de Centra Dana Esperantista Ligo. Tiaspecaj broŝuroj kaj flugfolioj sendube kontribuas al disvastiĝo de la lingvo kaj al altigo de la prestiĝo de la Esperanto-movado.

Du pliaj imitindaj ekzemploj meritas mencion. La unua estas la kvaronjara grandformata gazeto "La Lingua Internazionale Esperanto", eldonata kaj publikigata de prof. Corrado Cerri-Calzoni ekde 1966 en la itala lingvo. Ĝi enhavas bonajn artikolojn kaj multajn aktualajn informojn. La eldonkvanto estas 2 500 ekzempleroj, sed ĉ. 10 000 personoj legas ĝin. La alia imitinda ekzemplo estas la grandformata gazeto "Esperanto", eldonita de la Esperanto-Klubo en Kuopio (Finnlando). Ankaŭ ĝi enhavas artikolojn kaj informojn. La kostojn de la publikigo komplete pagis la multaj reklamoj de lokaj industriaj kaj komercaj firmoj. Inicijato, persista serĉado de eblecoj generas kelkfoje mirindajn kaj imitindajn sukcesojn. Ekspozicioj de esperantaĵoj (libroj, gazetoj, fakaj periodaĵoj, prospektoj) estas potencaj rimedoj de informado, ĉar ili per si mem laŭte parolas pri la atingoj de la Internacia Lingvo. Tamen, ankaŭ ekspozicio trafas la celon nur se ĝi estas kiel eble plej kompleta, lerte kaj moderne aranĝita, sisteme organizita. Pro la graveco de tiu demando, al ĝi estos dediĉita aparta artikolo.

Ĉiuj menciitaj rimedoj estas same gravaj. Ili apogas unu la alian. Apliki nur unu rimedon, aŭ eĉ kelkajn, ne povas doni la deziratajn rezultojn. Nur paralela kaj intensa utiligado de ĉiuj eblecoj donas vere pozitivajn rezultojn.



LOKE

Francujo

- Prezidanto Franz Jonas de Aŭstrujo akceptis komunan delegacion de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj SAT-Amikaro en la 22a de marto, dum sia ŝtata vizito al Francujo. La ŝtatestro parolis dum pluraj minutoj kun la delegacianoj dum oficiala akcepto en la hotelo Crillon, informiĝis pri la nuna pozicio de Esperanto en Francujo kaj petis transdoni salutojn al la francaj esperantistoj. Al demando "Ĉu Prezidanto Pompidou parolis kun vi pri la pozicio de la franca lingvo?", d-ro Jonas respondis: "Kompreneble — sed vi scias, kion mi opinias pri tio!" Pri la renkontiĝo raportis la franca radio *France-Inter*, la ĵurnalo

Le Monde kaj la telegrafagentejoj Reuter kaj Agence Centrale de Presse.


F. R. Germanujo

- La urba deputitaro de Mannheim nomis novan straton en la urboparto Käfertal "Zamenhofstrasse" (1972-02-29). La strato Zamenhof troviĝas en rondo de eltrovintoj Edison, Galvani, Marconi k.a.

Japanujo

- La plej vaste legata ĵurnalo *Asahi ŝimbum* (5 500 000 ekzempleroj da eldonkvanto) menciis en kutima rubriko "Transmara kulturo" la artikolon "La plej sekreta libro pri Esperanto", aperinta en la februara "Esperanto" (p. 28-29), kaj la tiurilatajn studojn de ĝia aŭtoro s-ro Ulrich Lins.

LOKE - FAKE - PERSONE



D-ro H. M. Maitzen (la dua de maldekstre), vicprezidanto de TEJO, dum sia restado en Ĉilio vizitis la instruministerion kun 3 ĉilianoj por informi pri Esperanto.

FAKE

Diplomatio

- S-ro Ralph Harry, aŭstralia ambasadoro en F.R. Germanujo, deĵoris ĉe UN komence de 1972 kaj prelegis en marto ĉe publika kunsido de Novjorka Esperanto-Societo pri utiligo de la Internacia Lingvo Esperanto por diplomatoj.

Kino

- Kadre de la Eŭropa Esperanto-Konferenco (de la 23a ĝis la 30a de julio 1972), organizita de Aŭstria Esperanto-Movado (Batthyanystrasse, Hofburg, A-1014 Wien), estos unuafoje Filmfestivalo. Krom prezenti Esperantajn filmojn, oni aranĝos konkurson por filmamatoroj.

PTT

- La 3a Ĉefkunveno de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) okazos en la 26a de julio 1972 en Szeged (Hungarujo), kadre de la Internacia Turista Renkontiĝo-Festivalo. Informanto: s-ro Emeriko Szekely, Szivarany u. 29, Szeged.

Turismo

- Internacian Turistan Renkontiĝon organizas TA-

NEF (Turista-Asocio "La Naturamikoj", Esperanto-Fako: Stieberg 6/22, A-1150 Vieno, Aŭstrujo). La Renkontiĝo okazos en bela montara regiono Maria Alm, Aŭstrujo, de la 2a ĝis la 9a de septembro 1972.

PERSONE

Kaŭabata

- Kaŭabata Jasunari, la aŭtoro de la romano "Neĝa lando", Nobel-premiita en 1968, sinmortigis en aprilo 1972. "Neĝa lando" aperis ankaŭ en Esperanto-traduko (vd. "Esperanto", februaro 1972, p. 27) kaj estas en la Serio Oriento-Okcidento de UEA.

Setälä

- S-ro Vilho Setälä, honora membro de UEA, okazigis en Helsinko ekspozicion pri siaj ĝis nun faritaj laboroj, okaze de sia 80-jara datreveno, en la 4a de aprilo 1972.

Svane

- S-ro Eskil Svane antaŭe membro de la dana delegacio en la Konsilo de Sekureco kaj cetere unu el la tradukintoj de la Ĉarto de UN en Esperanton, deĵoras kiel konsilisto de la dana ambasado en Bruselo ekde la 15a de aprilo.

LASTE APERIS . . .

Bonvenon al Kuopio Turisma prospekto kun mapoj, senpage ricevebla ĉe Kuopion Matkailupalvelu, Kuopio, Finnlando.

Bulgario. 32p. 20 x 20 cm. Turisma prospekto senpage ricevebla de: Komitato de Turismo, pl. Lenin 1, Sofio, Bulgarujo.

Esperanta prononco C.H. Dharmatilake. 16p. 14cm. 1,20 gld. Sinhallingva priskribo de la bazaj principoj.

Esperanta-vjetnama vortareto (1971) Nguyen phuoc Khang. 85 p. 15cm. Mimeo. 1,35 gld. Ĉ. 1300 vortoj kun kelkaj gramatikaj aldonoj. Eld. Esperanto-Grupo de Sajgono.

Esperanto leren 8p. 21cm. Senpaga. Ilustrita nederlandlingva listo de Esperanto-lernolibroj kaj -vortaroj por nederlandlingvaj lernantoj, kun prezoj kaj priskriboj. Eld. UEA.

Glumarkoj "Internacia Libro-Jaro" (1972) folio po 16 markoj, dukoloraj 0,40 gld.

Ĝenerala instruado en V.D.R., La (1971) 142p. 19cm. 1,80 gld. Ses artikoloj pri diversaj aspektoj de la kleriga sistemo en la Demokratia Respubliko Vjetnamio.

Horlogisto de Djen Bjen Fu, La 413p. 19cm. 2,40 gld. Elektitaj vjetnamaj noveloj el la periodo 1945–1964. 19 noveloj de 19 aŭtoroj. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1971.

Kio estas la baha religio . . . (1969) 60p. 18cm. 2,10 gld. Enkonduko kun multaj citaĵoj el la bahaaj sanktaj tekstoj.

Kuŝanta tigro Lilli Promet (1922–). 75p. 17cm. Ilus. 1,86 gld. El la estona tr. Alma Lekko. Dek kvar mallongaj noveloj de ŝatata verkistino.

Muzika leksikono, Esperanto-lingva (1972) J-B. Briano. 95p. 21cm. 8,40 gld. La unua parto, sur 13 paĝoj, donas simplajn italajn tradukojn de Esperantaj terminoj. La dua parto, sur 74 pj, donas tradukojn kaj detalajn, foje enciklopediajn difinojn en Esperanto de la italaj terminoj. Mallonga bibliografio.

Nova Testamento, La Kajero 8. 100p. 22cm. 4,— gld. Galatoj, Efesanoj, Filipianoj, Koloseanoj, 1 kaj 2 Tesalonikanoj. Eld. Int. Katolika Informejo. Kun referencoj kaj komentoj.

Problemoj de etnaj minoritatoj en Hispanio (1971) Arangis: U.J. Moritz. 40p. 21cm. 3,50 gld. Lingvaj kaj aliaj aspektoj de la situacio de la kataluna, galega kaj vaska popoloj. Bibliografio.

Rakontoj el Panĉatantra C.H. Dharmatilake. 20p. 14cm. 1,50 gld. Sep rakontoj en tre simpla lingvaĵo el la Kvin Libroj, la antikva fabelkolekto de la sanskrita literaturo.

Resumo pri Vjetnamio (1971) 128p. 19cm. 2,40 gld. Kun mapo kaj fotoilustraĵoj. Superrigardo de geografio, historio, kulturo, institucioj, ekonomio kaj politiko. Fremdlingva Eld. Hanojo.

Trans la fabeloceano . . . (1931) Ferenc Szilágyi (1895-1967). 135p. 20cm. 9,60 gld. Ledimita bind. Originalaj fabeloj kun vigla stilo, por infanoj kaj plenaĝuloj. Fotorepreso 1972.

Tuta Esperanto, La Henrik Seppik. 180p. 22cm. 6,30 gld. La dua internacia eldono de konata gramatika manlibro por progresintoj kaj gvidilo por kursestroj, verkita en sistema kaj populara maniero. Multaj ekzemploj kaj ekzercoj.

Vasta la flanko maldekstra Antti Eskola. 53p. 30cm. Mimeo. Politikaj artikoloj de finna profesoro pri sociopsikologio, tradukitaj el la finna. Mendebla ne ĉe UEA, sed ĉe: Lingvoponto, PF 119, SF-70101 Kuopio 10, Finnlando.

Voĉoj el Soveta Latvio (1971) 31p. 20cm. 1,20 gld. Artikoloj historiaj, literatura kaj priarta, plus kelkaj poemtradukoj.



Eldonaĵoj de Pekino

Leninismo aŭ social-imperiismo? — Memore al la centa datreveno de la naskiĝo de la granda Lenin (1970) 63p. 13cm. 0,40 gld. Ĵurnalartikolo. Kun portreto de Lenin.

Mina milito (1971) 178p. 13 x 19 cm. 1,15 gld. Bildrakonto laŭ samnoma ĉina filmo, pri la permina batalado de vilaĝanoj en 1942, dum la kontraŭjapana rezistmilito.

Venke marŝu antaŭen laŭ la revolucia linio de prezidanto Maŭ (1971) 18p. 13cm. 0,25 gld. Ĵurnalartikolo por novjaro 1971.

Vivu la venko de la proleta diktaturo — Memore al la 100-a datreveno de la Pariza Komunumo (1971) 58p. 13cm. 0,40 gld.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

Svedo diras —

Skribas Ebbe Vilborg (Svedujo)

Recenzante "Poŝatlasoj de la mondo" ("Esperanto", n-ro 795, p.45), H.A. de Hoog riproĉe demandas kial kelkaj svedaj riveroj en la atlaso finiĝas per *-äl*, aliaj per *-älven*. La kialo estas tre simpla: en kelkaj riveroj (ekz. *Dalälven*) la difina artikolo *-en* estas deviga, en aliaj, precipe tiuj enhavantaj genitivan formon de loknomo, ĝi devas ne enesti (ekz. *Pite älv*, *Lule älv*). La formoj de la atlaso estas tiurilate tute korektaj kaj ne povas kaŭzi riproĉon.

NEKROLOGO

HÉLÈNE ALBAULT

Hélène Albault, edzino de d-ro André Albault (prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj antaŭe estrarano de UEA), forpasis pro subita malsano, estante nur 46-jara. Esperantistino ekde la jaro 1949, ŝi gvidis Esperanto-kursojn, helpis la edzon kaj postlasis 3 infanojn, kiuj parolas Esperanton denaske.

PRELEGSEMAJNO

kun Lapenna, Bormann, Wells, Thierry,
Söderberg atendas vin en

FROSTAVALLEN

Informojn sendas s-ro J. Strönne, Amiralsg. 36,
S-211 55 Malmö, Svedujo.



TEJO-redaktoro:
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-
Sterkrade,
F. R. Germanujo

JUNULARO KAJ LA TRIA MONDO

La 28a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (IJK) okazos de la 16a ĝis la 22a de julio en Toruń, Pollando; estos antaŭkongreso en Varsovio, kaj postkongreso en Gdańsk. Aliĝojn ĝenerale akceptas Hans Bakker, Kastelenstraat 231, Amsterdam, Nederlando. Pluajn informojn vi trovos en antaŭaj numeroj. Prepara prokongresa seminario okazos de la 16a ĝis la 18a de junio 1972 en Hattingen, F.R. Germanujo; informas la redaktoro de ĉi tiu TEJO-paĝo.

Antaŭ nelonge aperis nova eldonaĵo de ArgentEJO, interesa kvarpaĝa broŝureto pri Esperanto, kun alloga teksto en la hispana lingvo; titolo: "Curiosidades del idioma internacional", haveblas ĉe la prezidanto: d-ro Rubén Feldman González, Av. S. Fee 1329, Firmata (S.Fé), Argentino.

"NOVAĴOJ, NOUVELLES, NEWS", N-RO 25, EN SES LINGVOJ!

Okaze de la jubilea numero de NNN, nia publika novaĵ-bulteno, ĝojiga novaĵo: dum pluraj jaroj ĝi aperis en la Esperanta, angla kaj franca lingvoj. Ekde la 25a numero aldoniĝas daŭre la germana kaj itala eldonoj; verŝajne eĉ, kiel la sesa lingvo, la hispana aliĝos!

TEJO-KONFERENCO EN PORTLANDO

Paralele al la kongresa semajno en Portlando (Oregono, Usono), de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 1972 okazos internacia junulara konferenco de TEJO, kun jenaj temoj: "Ĉu la moderna vivo polucias la menson" kaj "La loko de TEJO en la sino de UEA"; aldoniĝas seminarieto pri "Naturaj vivstiloj kaj serĉo al interna paco"; memkompreneble estos ankaŭ aro da amuzaĵoj, kiuj pliriĉigos la programon. Informpetojn bonvolu direkti al: s-ro Guy Matte, 214 Gloucester Avenue, Apt. 8, Ottawa 4, Ontario, Kanado.

ELSTARA AKTIVECO EN JAPANUJO

TEJA, t.e., Tokia Esperantista Junulara Asocio, jam delonge konata pro siaj "Aŭtunaj Kunloĝadoj" (seminarioj), kiuj ĉiam estas fruktoplenaj, nun raportis pri "Samtempaj Kursoj" — kursoj por komencantoj okazigitaj en 1971; la ok kursojn sukcese partoprenis 139 personoj. El la enhavo de la raporto: laboro farenda antaŭ la kursoj, kion fari, kiel informadi, kiel trovi taŭgajn gvidantojn, ktp. aldoniĝas statistiko kun rezultoj de enketo inter gelernintoj pri iliaj spertoj; ĉiu aktivulo aŭ rondo, planante kurson, ne pre studu tiun ĉi valoran broŝuron: ĝi haveblas ĉe la informinto, s-ro Tosiki Sasabe, 5-5, Ohora 1-tyome, Setagaya-ku, Tokio, 156 Japanujo, kontraŭ kvin respondkuponoj por la presaj kaj poŝtaj elspezoj.

KIO ESTAS "FONDUSO TUTMONDA HELPO"?

Kun la celo al pli bona kaj efika ebleco rekte subteni kaj subvencii malriĉajn unuopulojn kaj grupojn ekstereŭropajn per lernolibroj, vortaroj ktp., fondiĝis nova fonduso, kiu jam enhavas plurajn centojn da germanaj markoj; interesigantoj pretaj helpi aŭ serĉantaj helpon, turnu sin al la redaktoro de la TEJO-paĝo.



ESPERANTO EN AFRIKO

Jam de pluraj jaroj de tempo al tempo ni aŭdis novaĵojn pri kursoj kaj interesiĝo pri la Internacia Lingvo flanke de junaj homoj en Kongo (Kinŝasa), la nuntempa Respubliko "Zairujo", sed nur nun, sub la gvido de la juna instruisto Paŭl Nzemba-Paku, revigliĝas la agado tie, kaj planiĝas fondiĝo de Zaira Esperanto-Junularo; i.a. li lanĉis Centron por la Dismastigo de Esperanto en Afriko (CDEA) kaj momente denove gvidas plurajn kursojn inter junaj geskoltoj. Apuda foto montros al vi kvar el la kursaninoj. Por pli detalaj informoj oni turnu sin al: s-ro Paŭl D. Nzemba-Paku, B.P. 198, Kin/Limite, Zairujo/Kongo (Kinŝasa).

KOREA ESPERANTO-JUNULARO RAPORTAS

Mallonge iom pri la agado en 1971: i.a. okazigis korean-japanan Esperanto-seminaron, somerajn kursojn, vintran kurson, kaj novembran prelegkunvenon de prof. Taekeng Gim la prezidanto, en Taegu, partoprenis entute pli ol 800 personoj!

DANGERMANAJ KONTAKTOJ:

De la 25a ĝis la 27a de februaro en Felsted, suda Danlando, proksime al germana landlimo, okazis sukcesa dangermana renkontiĝo junulara, parolis Harald Schicke (Hamburgo) pri la problemoj de la Esperanto-literaturo kaj libro-merkato, la ĝenerala temo de la aranĝo, kiun entute partoprenis dudeko da gejunuloj el ambaŭ landoj; favore raportis Dana Radio kaj diversaj regionaj gazetoj. Informas f-ino Else Rasmussen, Nygade, Felsted, DK-6200 Aabenraa, Danlando.

ESPERANTO KAJ LA KIMRA LINGVO

Jam de pluraj jaroj estas kontaktoj inter la kimra naciista junularo kaj la juna esperantistaro; ĉefa agadcelo de la kimra junularo estas vivtenado de la belsona esprimriĉa kimra lingvo kaj la pitoreska folkloro, do la nacia identeco de tiu malgranda, ŝatinda popolo de "bonkoraj, ĥorkantantaj ministoj". Pri kimraj aferoj oni povas ricevi informojn pli detalajn de: Swddfa'r Urdd, Aberystwyth, Sir Aberteifi, Cymru/Kimrujo/Wales, Britujo.

LA AŬTOMOBILLO

La ecoj, kiuj karakterizas la aŭton, estas pluraj kaj tre diversaj. Unuj *priatentas*, antaŭ ĉio, la konstruon, la modelon, la formon, la karoserion, dum aliaj interesiĝas multe pli pri la teknikaj detaloj, la motoro kaj ĝia cilindra kapacito, la maksimuma potenco (kiun oni esprimas normale en 'ĉeval-povoj' - Ĉp -), la *strat-adhero* kaj la akcelado de la veturilo en difinita temp-unuo.

La fenestroj de aŭtomobilo nomiĝas glacoj. Je la antaŭa glaco estas du glaco-viŝiloj, kiuj — en multaj tipoj de aŭtoj — povas funkcii je du rapidecoj. Kiam preterveturanta aŭ antaŭ-iranta aŭto ĵetas malpuraĵojn aŭ koton kontraŭ la antaŭan glacon de via veturilo, vi povas funkciigi la glaco-lavilon per simpla premado de butono. Ĝi tiam *ŝprucigas* puran akvon kontraŭ la glacon kaj tiel forigas la malpuraĵon.

Super la kvar radoj de aŭtomobilo troviĝas kot-ŝirmiloj, kiuj plej ofte formas integran parton kun la karoserio.

Por startigi la motoron, oni agu jene: Unue oni metas la rapiduman levilon en neŭtran pozicion. Tion farinte, oni turnas la startigilon, malforte premante per la dekstra piedo la gas-pedalon, ĝis la motoro startas. Tiam oni enpremas, per la maldekstra piedo, la kluĉilon kaj en-konektas la unuan rapidumon. *Lasante releviĝi malrapide la kluĉilon*, oni denove kluĉas, en-konektas la duan rapidumon kaj tiel plu.

Aŭtoj de meza prezo-klaso normale havas 4 rapidumojn kaj unu retro-rapidumon. Preskaŭ ĉiuj usonaj markoj — kaj ankaŭ diversaj eŭropaj — posedas la tiel nomatan aŭtomatan rapidum-skaton, kiu ne plu necesigas ŝalti de unu rapidumo al alia. Laŭ la rapideco de la veturilo *en-konektiĝas* aŭtomate la diversaj rapidumoj. Por veturado en montaj regionoj aŭ sur deklivoj estas provizita speciala pozicio por la stango, en kiu pozicio la rapideco de la aŭto estas aŭtomate reduktita.

Oni direktas (ĝiras) la aŭtomobilon per stirilo (stirado). Por malrapidigi aŭ haltigi ĝin, oni devas piedpremi la brems-pedalon. La bremsoj povas agi ĉu sur la malantaŭaj radoj, ĉu sur ĉiuj kvar radoj samtempe. Ĉiu taŭge ekipita aŭtomobilo havas rezervan radon kun pneŭmatiko. Tiun lastan oni nomas mallonge 'pneŭo'. Plej ofte la rezerva rado estas lokita en la kofrujo aŭ apud la motoro, sub la kapoto (t.e. la metala kovrilo de la motoro, kiu estas malfermebla). La kofrujon oni uzas por transporti siajn valizojn kaj aliajn bezonaĵojn dum ferio-vojaĝoj aŭ aliaj *delokiĝoj* kaj ĝenerale por ĉiuj ŝarĝoj, kiuj estas tro grandaj, tro pezaj aŭ tro volumenaj por esti metitaj en la kupeon.

Je la antaŭo kaj malantaŭo de aŭtomobilo estas muntitaj la bufroj, kromitaj stangoj el ŝtalo, kiuj servas por protekti la veturilon en kazo de kunpuŝiĝoj. Sur, sub aŭ super la bufroj troviĝas la numerplatoj.

Fronte al la ŝoforo estas la instrument-panelo, sur kiu estas videblaj diversaj instrumentoj, mezuriloj kaj akcesoraĵoj. Ni menciuj kelkajn el la plej oftaj, kvankam la aranĝo de la instrument-panelo varias de tipo al tipo: ŝaltiloj por la parklumo kaj reflektoroj; rapido-metro kaj kilometra mezurilo: akvo-termometro; benzinometro; kontrol-lampoj por benzino kaj oleo-premo; kontrol-lampo por la generatora ŝarĝo; intermite lumantaj lampoj, indikantaj, ke la ĝir-indikilo funkcias; startigilo; lampeto, kiu ruĝe eklumas, kiam la manbremso estas streĉita; butono por klimatiso; ventolilo (por aerumi la internon de la kupeo); butono de la glaco-viŝiloj; butono de la glaco-ŝprucigilo.

En la instrument-panelo troviĝas ankaŭ la ganto-ŝranketo, kiu servas por konservi en ĝi la necesajn aŭtopaperojn, gantojn, aŭto-kartojn kaj aliajn *dumvojaĝajn bezonaĵojn*.

En iom luksaj modeloj estas en-konstruita radio-ricevilo kun unu aŭ du laŭtparoliloj.

La seĝoj en aŭtomobila kupeo estas tegitaj per ŝtofo, ledo aŭ led-simila materialo. Ofte la dors-apogiloj de la antaŭaj sidlokoj estas reguleblaj laŭ gusto kaj komforto de la pasaĝero.

Por teni aŭton en bona stato estas necese, ke la posedanto regule lubrikigu ĝin en garaĝo aŭ servo-stacio. Same necesas, je regulaj intertempoj, renovigi la oleon en la oleo-verŝujo kaj kontroli la nivelon de oleo en la kardano.

Klarigoj:

priatenti ion: atenti pri io. En Esperanto oni ofte metas la prepozicion 'pri' antaŭ la verbon, tiel formante (novan) transitivan verbon. Kelkaj ekzemploj estas: *silenti pri* = *prisilenti*; *rigardi pri* = *pririgardi*; *mediti pri* = *primediti*; *zorgi pri* = *prizorgi*, ktp.

strat-adhero: *adheri* = fiksiĝi al io. Se aŭto bone fiksiĝas al la strato, t.e. se ĝi ne facile glitas flanken en kurboj aŭ sur malsekaj kaj glitigaj stratoj aŭ ŝoseoj (se ĝi ne facile joras), tiam oni diras, ke ĝia *strat-ahero* estas bona.

ŝprucigi akvon: 'ŝprucigi' = la transitiva formo de la netransitiva verbo 'ŝpruci'. Fontano ŝprucas. Larmoj ŝprucas el ŝiaj okuloj. Per ŝprucigilo li ŝprucigis akvon sur la rozojn en ŝia ĝardeno. Enŝprucigilo estas instrumento por injekti (injektilo).

lasante releviĝi la kluĉilon: = kiam oni lasas la kluĉ-pedalon relevi sin (reveni en la normalan pozicion). Atentu, ke la subjekto, kaŝita en tiu ĉi sub-frazo (oni), devas esti la sama kiel en la ĉefa propozicio (oni ekveturigas...).

en-konektiĝi: *enkonekti* la unuan rapidumon = meti la motoron en ĝian unuan rapidon. Se la diversaj rapidumoj aŭtomate sekvas unu post la alia, ili *enkonektas* sin (= *enkonektiĝas*) aŭtomate.

delokiĝo: *loki* = meti ion en iun lokon. De-loki = meti ion, (aŭ iun) de unu loko al alia. De-loki sin = *delokiĝi* = movi sin mem de unu loko al alia.

fronte al: = antaŭ, sur la fronta flanko, vid-al-vide al.

klimatiso: de la verbo 'klimatizi'. Ĝi signifas "teni ia klimaton en iu ajn ejo agrabla kaj konstanta". Komparu: klimatisita kinejo; klimatisita oficejo.

dumvojaĝaj bezonaĵoj: = aĵoj, kiujn oni bezonas dum vojaĝo. Komparu ankaŭ: dumviva membro, dumtagaj laboroj, dumnoktaj sonĝoj.

20 jaroj da elsendoj de Svisa Radio



Profesoro Edmond Privat,
iama honora prezidanto de
UEA, donis al la Esperanto-
elsendoj de la Svisa Radio
enhavon humanisman.

Svisa Radio en la nuna jaro celebras la dudek-kvinan datrevenon de la komenco de Esperanto-programoj. Dum la vintro 1946-47 prezentis ĉiusemajne kvin-minutan rubrikon profesoro Edmond Privat. Post la Universala Kongreso okazinta en Bern en la jaro 1947, d-ro Arthur Baur prezentis duan ĉiusemajnan rubrikon. Ambaŭ programoj estis baldaŭ duobligitaj tiamaniere, ke ĉiu estis elsendita dufoje en la semajno. Ekde la jaro 1962 ĉiu el la paroladoj atingis daŭron de ok ĝis naŭ minutoj.

Prof. Privat pritraktis temojn pri internacia kunvivado, federismo, humaneco, parolis pri siaj personaj travivaĵoj kun Mahatma Gandhi, kiun li admiris kiel modelan homon. Li bedaŭrinde mortis en la jaro 1962, sed nun s-ro Claude Gacond prizorgas la rubrikon en la sama spirito.

D-ro Arthur Baur prezentas al la eksterlanda publiko Svislandon laŭ ĝiaj geografiaj, historiaj, politikaj kaj aliaj apartecoj, kaj tion faris dum la pasintaj dudek-kvin jaroj.

Menciinda estas la dekmonata ĉesigo de la programoj dum la jaro 1965 pro financa kaŭzo en la administrado de svisa radio; la alveno de multnombraj leteroj de aŭskultintoj en la tuta mondo konvinkis la direktoron de la kurtonda radio pri la taŭgeco restarigi la Esperanto-programon. Tio montras al esperantistoj, ke radio-elsendoj en la Internacia-Lingvo dependas de la reago de la publiko.

Ni memorigas, ke la adreso de la stacio estas: Svisa Radio, S. O. C., Esperanto-programo, CH-3000 Bern 16, Svislando. Informilo pri programoj, publikigata dufoje en la jaro, estas sendata al ĉiu petanto.

USONA RADIO. La kurso dissendata pasintjare de la stacio de la Publikaj Lernejoj Columbus estas dum la studjaro 1971-72 prezentata kvin tagojn ĉiusemajne de la stacioj WKTL en Struthers (Ohio) kaj WCNE en Batavia (Ohio), unu tagon ĉiusemajne de la stacioj KOAC en Corvallis (Oregon) kaj KOAP en Portland (Oregon). La kurso konsistanta el 150 kvinminutaj sonbendoj estas havebla por angle-parolantaj landoj kontraŭ abonkotizo. Ĉiuj informoj estas haveblaj de s-ino Robert L. Wills, 94 West Riverglen Drive, Worthington, Ohio, 43085 Usono.

MALAGASA RADIO. De la fino de januaro la stacio Radio Université en Tananarivo dissendas kurson en la franca lingvo ĉiun lundon de la 16.45 ĝis 17.00 h. per ondoj 235 m (1275 kcs) kaj 88.02 m (3370 kcs). Adreso de la stacio: Radio Université, B.P. 909, Tananarivo, Malagasa Respubliko.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan numeron.



57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Portland (Oregon), 1972 07 29 — 08 05

Alta Protektanto: Tom McCall, estro de la ŝtato Oregon, Usono.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Aliĝkotizoj post la 1-a de aprilo 1972

1. Kongresano ne membro individua de UEA	120,—
2. Kongresano individua membro kun Jarlibro (MJ)	105,—
3. Kongresano individua membro kun Jarlibro kaj <i>Esperanto</i> (MA)	90,—
4. Edz(in)o de Kongresano en Kategorio 1	84,—
5. Edz(in)o de Kongresano en Kategorio 2 aŭ 3	73,50
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	36,—
7. Universitata studento ĝis inkluzive 30-jara	60,—
8. Blindulo	48,—



KALEN- DARO

Majo

6-7	Dana jarkongreso, Silkeborg
6-9	Ĉeĥa kongreso, Ostrava
6-12	Internacia fervojista kongreso, Lugano, Svi.
11-14	Ornitologa renkontiĝo, insulo Texel, Ned.
13	Nederlanda jarkunveno (LEEN), Zaandam
13-14	Kultura semajnfino, Renens apud Lausanne, Svislando
19-22	50a germana kongreso, Braunschweig
20-22	Sveda kongreso, Västerås
26-29	Brita kongreso, Brighton

Junio

17	Limdato por aliĝo al Universala Kongreso
26-1-7	Somera Univ. de Turku, Finnlando

Julio

2-4	Bulgara kongreso, Smoljan
2-8	Somera univ., Jyväskylä, Finnlando
2-23	Kulturaj semajnoj, Grésillon, Francujo
2-23	Infana int. renkontiĝo, Grésillon
5-22	Seminario por pedagogoj, Primošten, Jug.
9-15	10a somera univ., Gyula, Hungarujo
9-12-8	Somera tendaro, Lančov apud Vranov, Ĉeĥ.
14-16	Antaŭkongreso de TEJO, Varsovio, Pol.
15-16	Japana kongreso, Takamatu

Por la limdatoj validas la dato de la pago. Usonaj, kanadaj, eventuale aliaj elamerikaj kaj eĉ japanaj esperantistoj prefere sendu sian kongresaliĝilon kaj la monon rekte al la adreso de la Kongreso: 57-a UK de Esperanto, P.O. Box 786, Portland, Oregon 97207, Usono.

Adreso de KKS

Se oni skribas al la kongresa sekretario s-ro Nevan pri aferoj, kiuj ne rilatas al administrado (pagoj, mendoj ktp.), oni bonvolu adresi la leterojn *post la 15-an de aprilo 1972* al la 57-a UK de Esperanto, P.O. Box 786, Portland, Oregon 97207, Usono.

Glumarko reeldonita

Post kompleta elĉerpiĝo de la unua eldono (45 000 glumarkoj), la Kongreso reeldonis la kongresan glumarkon en plua kvanto de 20 000 ekzempleroj. Prezo por 10-marka folio estas 0,55 gld. afrankite (por Nederlando: 0,62 gld.) Mendojn akceptas la Libroservoj.

Esperanto-kursoj en Portland

Dum tri semajnoj antaŭ la Universala Kongreso en la Universitato de Portland oficialaj kursoj de la Internacia Lingvo sub la gvido de universitataj profesoroj

- 15-21 Int. katolika kongreso, Como, Italujo
- 15-31 Inter. laborkampo, Roccasecca, Italujo
- 16-22 28a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Toruń, Pollando
- 16-13-8 20a Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslov.
- 17-23 Hungara kultura festivalo, Budapeŝto
- 18-24 Int. instruista kongreso, Budapeŝto, Hung.
- 20-23 7a brazila seminario, Curitiba
- 20-25 32a hispana kongreso, Vigo
- 22-25 Postkongreso de TEJO, Gdańsk, Pollando
- 22-28 Sennaciista kongreso, Kuopio, Finnlando
- 23-6-8 Du semajnoj "20-jara datreveno", Grésillon
- 23-30 Eŭropa E-konferenco (filmfestivalo), Vieno
- 24-26 14a kanada kongreso, Victoria (B.C.)
- 24-1-8 Int. tendaro, Toruń, Pollando
- 24-2-8 5a int. naturamika renkontiĝo, Abaliget, Hun.
- 24-3-8 Int. turista renkontiĝo, Szeged, Hungarujo
- 26-2-8 25a int. kristana kong., La Rochette, Fran.
- 29-5-8 57a Universala kong., Portlando, Oregono Usono
- 30-5-8 Seminario mediteranea, Rethimnon, Grek.
- 30-6-8 Sveda somera semajno, Frostvallen
- 30-27-8 Someraj universitataj kursoj, Lieĝo, Belgujo

Aŭgusto

- 6-13 Oficiala Postkongreso, Sanfrancisko, Usono
- 6-27 Studsemajnoj, Grésillon
- 12-19 Eŭropa E-konferenco, Zagrebo, Jugoslavio
- 19-31 40a int. blindula kong., Rimini, Italujo
- 27-10-9 Kulturo kaj ripozo, Grésillon

Septembro

- 2-9 Int. turista renkontiĝo, Maria Alm, Aŭstrujo
- 9-10 Amika renkontiĝo, Dudince, Ĉeĥoslovakujo
- 18-1-10 8a int. feriado, Międzygórze, Pollando
- 22-24 Aŭstra kongreso, Klagenfurt
- 22-24 Aŭstra/jugoslava/itala renkontiĝo, Klagenfurt
- 30-7-10 5a int. pupteatra festivalo, Zagreb, Jug.

Duncan Charters, Edmund Brent kaj Richard E. Wood. Detale informas kaj aliĝojn akceptas s-ino Hazel Heusser, 6644 S.E. 82nd Avenue, Portland, Oregon 97266, Usono.

Organizaĵoj invitas esperantistojn

Oregona Advokata Asocio, Oregona Medicinista Asocio kaj diversaj porpacaj kaj religiaj organizaĵoj invitas eksterlandajn gastojn de la koncerna fako al specialaj kunsidoj kaj komunaj lunĉoj. Atendataj estas ankaŭ kunvenoj kun Leonoj Internaciaj, Rotarianoj kaj reprezentantoj de aliaj internaciaj organizaĵoj.

Statistiko (29 marto 1972)

Argentino 2, Aŭstralio 7, Aŭstrujo 2, Belgujo 9, Brazilo 4, Britujo 21, Bulgarujo 12, Ĉeĥoslovakio 4, Danlando 5, Egiptujo 5, Finnlando 15, Francujo 35, F.R.Germanujo 29, Grekujo 4, Hispanujo 12, Hungarujo 5, Israelo 1, Italujo 24, Japanujo 23, Jugoslavio 9, Kanado 31, D.R.Kongo 2, Koreujo 8, Madagaskaro 1, Meksiko 9, Nederlando 37, Norvegujo 8, Nov-Zelando 5, Peruo 1, Pollando 6, Portugalujo 3, Rumanujo 1, Sovet-Unio 1, Svedujo 26, Svislando 11, Usono 239, Venezuelo 1.

Entute 618 aliĝintoj el 37 landoj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 456, 1 aprilo 1972

NOVAJ KOTIZOJ EN DANAJ KRONOJ

Sekve al kurzoŝanĝoj ekvalidas nova tarifo de la UEA-kotizoj en danaj kronoj:
MJ 33,—; MA kaj MA-K 66,—; MS 99,—; J-MJ 16,50; J-MA kaj SA 49,50; abono je "Kontakto" 18,—; abono je "LMLP" 55,— danaj kronoj.

RAPORTO PRI 1971

La estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj d-ro Werner Bormann, dankas al ĉiuj asocioj, kiuj jam sendis al li raporton pri 1971 kaj sian revuon, kaj sincere petas la aliajn plenumi la cirkuleran peton.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ


Csüllög Georgo, Vésztó, Hungarujo.
Lucchetta Girolamo, Meda, Italujo.
Waters, Bryce, Burnaby, Kanado.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1972

174, J. Hubalek, 175 f-ino S. Stamm; Aŭstrujo. 176 A. Degryse, Belgujo. 177 s-ino E. B. Knight, 178 s-ino R. Seddon, 179 f-ino P. C. Sinclair: Britujo. 180 C. H. Dionísio, 181 Luiz Carlos Franco; Brazilo. 182 H. Rousseau, Centrafrika Respubliko. 183 Birthe Zacho, Danlando. 184 Lauri Vuolo, Finnlando. 185 J.P. Beau, 186 f-ino M-T. Boiton, 187 H. Dabiezies, 188 P. Poly; Francujo. 189 Ludwig Bechtold, 190 Erdmann Fritsch, 191 Martin Gründler, 192 B.

ANONCETOJ

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,45 gld. (1 int. respond-kupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas sole nur la anoncantoj.



34-jara kuracisto (pediatro) volas interŝanĝi diverslandajn Novajn kaj Malnovajn Testamentojn kontraŭ nialandaĵo pere de kelkfoja korespondado. Yung Kyung Kim, Kliniko Myoung In, 1020 Bong Deok Dong, Taegu, Koreujo.

Facile atingebla de Eŭropo estas la apudmara, sudangluja feriejo Hastings, Sussex, kie en bona, komforta gastdomo "Croft House", The Croft, esperantistoj ĉiujare libertempas. Suferantoj je diabeto ankaŭ bonvenaj.

24-jara fraŭlino, kiu ĵus finis la filozofian fakultaton de Sofia Universitato kaj laboras kiel laborpsikologo, ŝatas korespondi pri sia specialeco, kun gekolegoj el ĉiuj landoj. Adreso: Esperantina Konstantinova, "Iv. Zabĉeto" str. 2, Sofio 10, Bulgarujo.

Ni deziras korespondi kun danaj geinstruistoj aŭ profesoroj pri kolektivaj interŝanĝoj. I.B.B.E.M., 9 Strato Leavignotte, F-64-Pau, Francujo.

Korespondadon pri pornografio deziras: José da Silva, Caixa Postal D-19, 88800-Criciúma-SC, Brazilo.

Someraj Universitataj Kursoj 1972 pritraktos lingvistikon kaj medicinajn sciencojn. Informas: SUK-72, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgujo).

Partoprenu la kanadan kongreson de Esperanto en Victoria de la 24a ĝis la 26a de julio. Karavane al Portlando. Informoj: K.K. de Esperanto, 1712 Haultain, Victoria, B.C., Kanado.

Rita Burns, 20-jara studentino, kaj dek aliaj membroj de la nove-formita universitata E-klubo apud Nov-Jorko deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Adreso: Essex County College, Dept. of Foreign Languages, Newark, New Jersey 07102, Usono.

Bonvolu plibonigi anoncon en Jarlibro, paĝo 180. Tel-Aviva Esperanto-Klubo kunvenas ĉiuĵaŭde en Beit Lesin, str. Weizman 34.

Junulargastejo en la belega insulo Samos (Greklando). Tranoktado: 3 svisaj frankoj. Ĉiutage vaporŝipoj al Turkujo. Esperanto parolata. Pliaj informoj: s-ino Roxani Manoussou, Rhodou 23, Ateno 821, Greklando.

Vizitu Cullera (Valencio), Hispanujo. Ripozu trankvile dum via feriado en la ĉarma urbeto. Monto, kastelo, lumturo, rivero Júcar, longa strando, maldika sablo kaj milda vetero dum la tuta jaro, lagoj kaj fiŝoj. Senpaga informo pri aĉetado aŭ luado de apartamentoj apud strando. Rekte de la konstruanto al aĉetanto. Certe respondos, se vi sendos respondkuponon; Esperanta, angla kaj franca lingvoj. Skribu al José Barbero Nikolau, str. Alkazar de Toledo 39 A 18, Cullera (Valencio), Hispanujo.

Ferioj kun senco. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu semajnon (1972 07 22-29) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Kopenhago F., Danlando.

Finna sinjorino deziras korespondi kun geesperantistoj inter 35-55 jaroj el tuta mondo. Maila Pulli, Rouskunkatu 8 A 9, SF 55510 Imatra 51, Finnlando.

Komencante printempe 1972 mi instruas Esperanton laŭ metodo Friis al 25 universitataj studentoj, kiuj deziras korespondi kun alilandanoj. Interesitoj bonvolu skribi al John Gadway, Department of Foreign Languages, Southern Illinois University, Carbondale, Illinois 62901, Usono.

Oficiala informilo

(daŭrigo de p. 99)

Hasecke, 193 Hans Ph. Wuenschel; F. R. Germanujo. 194 s-ino Anastasia K. Eliopulu, 195 Kimon G. Eliopulos; Grekujo. 196 Josep Castelltort Riba, 197 Jaime Perarnau; Hispanujo. 198 Rosario Sgroi, 199 Lucia Terrazzani; Italujo. 200 A. Breddels, 201 s-ino A. B. M. Coppens, 202 f-ino N. L. Daams, 203 J. W. Perdeck, 204 F. H. Sachs; Nederlando. 205 Andrejs Armanis, 206 Ole Børresen, 207 P. Engen; Norvegujo, 208 Helmer Almén, 209 Nils Brandemar, 210 Axel Eriksson, 211 Gävle Esperantoförening, 212 A. Johansson, 213 f-ino G. Mellberg, 214 s-ino G. Nylin, 215 C. Olsson, 216 Olle Olsson, 217 E. Schuldenfrei; Svedujo. 218 Ralph H. Beard, 219 George Lockhart, 220 D. Money, 221 David R. Morey, 222 R. A. Swenson, 223 s-ino Bertl Werny; Usono.

DONACOJ 1972 (gld.)

Fondaĵo Canuto: Britujo: K. Bartošik, 8,35. F.R. Germanujo: F. Liebl, 38,50. Islando: K. Sigurdsson, 11,45. Nederlando: f-ino W. Steffering, 34,27; F.

Zeiler, 30,—. Svedujo: E. Breander, 19,95. Du donacintoj nekonataj po 24,40. Sumo ĝisnuna: 271,32.

Ĝenerala Kaso: Diversaj donacoj pere de Internacia E-Muzeo Vieno: 19,25. Aŭstralio: s-ino A.G. Browne, 5,98. Britujo: H. Davies, 26,—. Danlando: B.S. Trier, 46,—. F.R. Germanujo: s-ino E. Kruse, 19,81; G. Schmidt, 11,24. Grekujo: K. Eliopoulos, 46,24. Hispanujo: A. Bohigas, 2,21; M. Casanoves, 12,98; J. Castelltort 6,40; J. Perarnau, 6,40; E-grupo "Stelo de Paco", 4,93. Nederlando: J. Aarse, 5,—; F. H. Kat, 30,—; f-ino Van den Hengel, 69,54; nekonato (pere de la Libroservo), 0,14. Sumo ĝisnuna: 323,22.

Kampanjo "100 x 100": (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

52 D. Masterman, F.R. Germanujo.

53 S. Docal, Usono.

54 G. Schmidt, F.R. Germanujo.

Patronaj membroj A de TEJO 1972: 11 R. Van Humbeeck, Belgujo. 12 W. Klünder, 13 U. J. Moritz; F. D. Germanujo. 14 s-ino L. Terrazzani, Italujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

Por eldoni la gazeton
"INFANOJ DE LA MONDO"
 kunlaborantoj
 estas serĉataj

Ni jam publikigis tri
 numerojn de la gazeto
 jam antaŭ dek jaroj.
 Pro diversaj kaŭzoj
 vole ne-vole estis
 devigite ĉesigi la el-
 donon de la gazeto ĝis
 hodiaŭ. Sed la favora
 tempo fine alvenis kaj
 decidigis nin reeldoni
 la gazeton.



Ni nun elkore deziras havi kunlaborantojn en diver-
 saj landoj por la gazeto. Proponu vian intencon sub-
 teni nin kune kun utilaj manuskriptoj kaj aliaj mate-
 rialaĵoj, ekz-e bildoj, fotoj ktp. Ni rekompencos vin
 per sendo de kelkaj farotaj gazetoj "Infanoj de la
 mondo". (K. Matubara)

AMO-AKADEMIO, Tenmori, Kôzôzi, Aiti-ken, Japanujo.

URĜE BEZONATAJ

por la vastiĝantaj laboroj de
 la **CENTRA OFICEJO** de UEA en Rotterdam:

pluraj lertaj, agemaj, bonhumoraj, inteligentaj kaj
 nelacigeblaj oficistoj – prefere el landoj de la Eŭropa
 Ekonomia Komunumo.

Minimuma malneta salajro (ekde
 23-jara aĝo): 812,50 guldenoj monate
 (nete, por fraŭla oficisto, ĉ. 580,— gld.)
 + jara ekstraĵo 8%.

Se vi havas normalan tajp-kapablon kaj almenaŭ
 kelkajn el la menciitaj ecoj, skribu hodiaŭ al la
 Direktoro de la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg
 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Aĉetebla: tereno de prok-e 30 000 m²
 (= 7,4 akreoj) sur sud- do sunflanka deklivo a-
 pud Aspremont, malpli ol 20 km for de Nice
 (Francujo).

La tereno situas je 500 m de ĉefvojo, estas mal-
 ebena kaj surhavas arbojn kaj arbustojn. Ĝi taŭ-
 gas por kampadejo aŭ post preparlaboroj por
 konstruotaj feridomoj. La klimato kaj ĉirkaŭa-
 ĵo estas idealaj.

Tiun ĉi terenon UEA ricevis de la dume forpa-
 sintaj ges-roj Yelland.

Informojn oni petu ĉe la Centra Oficejo de
 UEA.

Fondita en 1966

LA LINGUA INTERNAZIONALE

Iama "L'Araldo Esperantista" (1926) **ESPERANTO**

Fondinto-Redaktoro: Corrado Cerri-Calzoni

Itallingva poresperanta gazeto.

Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona.
 Papero flavkolora. Verda inko. Presita.
 Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Ne estas fiksita abonkotizo. Ĝi estas sendata al
 tiuj personoj itallingvoparolantaj, kiuj faras ofer-
 donon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj
 interesiĝas pri la internacilingva problemoj.

SENPAGE ĝi aperigas korespondajn anoncetojn de es-
 perantistoj tutmondaj, kiuj deziras ekilati kun "ital-
 (in)oj". KOMPENSU aldonante "uzitajn poŝtmar-
 kojn", kies valoro (antaŭ nuligoj) sufiĉu por afranko
 de registrita letero al eksterlando.

Adreso: LA LINGUA INTERNAZIONALE esperanto
 (Direttore: Corrado Cerri-Calzoni)
 Casella Postale 159, I-13051 BIELLA (VC)
 Pĉk: Corrado Cerri, Direktoro LI-espo, n. 5-742,
 I-13051 Biella (VC).

PARAPSIKOLOGIISTOJ

esperantistoj, kiuj ŝatas kolektiĝi ideo,
 estas petataj tuj skribi al s-ro

Prof-o Corrado Cerri-Calzoni
 Casella postale 159, I-13051 Biella, Italujo

FROSTAVALLLEN

Interesa prelegsemajno (tuj post Helsingör) en
 idilia naturo.

Petu informojn kaj programon de
 s-ro Jan Strönne, Amiralsg. 36,
 S-211 55 Malmö, Svedujo.



Venu al Kuopio konatiĝu kun Finnlando

La Esperantokongreso de SAT 22.–28. de julio en Kuopio

Ĝuu la finnan someron en propra ferikabano antaŭ, dum aŭ post la kongreso. Vi povos pasigi ĝuplenajn feritagojn aŭ -semajnojn en ferivilaĝoj sur la strandoj de purakvaj lagoj. La prezoj 100-400 FMK po semajno.

Vian komforton pliigas la multflankaj vojaĝservoj de Kuopio: aviotaksio, lupreno de aŭto aŭ motorboato, gvidataj rondveturoj, la kongresa krosado k.a.

Speciala servo al kongresantoj

La ĉarto-flugo Frankfurt a/M — Kuopio

— Frankfurt a/M ekde 560 GM. La ekflugoj el Hamburgo kaj Frankfurt merkrede. Al la prezo inkluziviĝas la loĝado kun matenmanĝo dum 2 semajnoj.

Vendo: Neckermann und Reisen.

La 45-a kongreso de SAT estos grava kaj interesa evento en ĉi tiuj latitudoj. La programo enhavos multajn originalajn kaj fascinajn erojn. La postkongresaj ekskursoj direktiĝos al Nordkabo (jam finvendita) kaj al Leningrado. Petu pliajn informojn kaj aliĝilon ĉe Lingvoponto, Pf 119, SF-70100 Kuopio 10.

Pliajn informojn

KUOPION MATKAILUPALVELU

Haapaniemenkatu 17, SF-70100 Kuopio 10; tel. 14 101.

